



EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

1

1970

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Akceptis Reprezentantojn Partoprenintajn la Solenon de la Nacia Festo kaj Komandantojn kaj Batalantojn de PLA Estantajn en Pekino

En la 11-a kaj 14-a de oktobro, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin akceptis unue reprezentantojn venintajn el la tuta lando al Pekino partoprenintajn la solenon de la nacia festo kaj poste komandantojn kaj batalantojn de PLA estantaj en Pekino. En brila sano kaj kun vigla animo Prezidanto Maŭ tre ĝoje manklakadis kaj mansvingadis al la reprezentantoj kaj la tuta kunvenejo bolis en tondraj ĝojkrioj. La reprezentantoj kaj revoluciaj batalantoj ĝojkriis kun senkompara emociĝo: “Vivu Prezidanto Maŭ!” “Longe vivu Prezidanto Maŭ!”



La reprezentantoj ĝojkriadas: “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”



Prezidanto Maŭ manklakas al la reprezentantoj partoprenintaj la solenon de la nacia festo.



Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Viceprezidanto Lin intime salutas la revoluciajn batalantojn dum la varma vivuado.



Vidinte la ruĝan sunon en sia koro Prezidanton Maŭ, la revoluciaj batalantoj laŭte kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Kamarado Lin Biaŭ en la Periodo de la Liberiga Milito en Nordoriento

(Daŭrigo)

“UNU PUNKTO KAJ DU FLANKOJ” K. A.

La dek militaj principoj difinitaj de Prezidanto Maŭ estas akra armilo por ni venki en- kaj ekster-landajn malamikojn. Kaj Komandanto Lin plej bone kapablis uzi en praktiko tiujn militajn principojn de Prezidanto Maŭ kaj lernigi al siaj subuloj uzi ilin.

Unu el la elstaraj atingoj de Komandanto Lin en praktika uzado de la dek militaj principoj estas tio, ke li elmetis taktikojn kiaj “unu punkto kaj du flankoj”, “tri-tri-sistemo”, “tri furioze-oj”, kaj “kvar rapide-oj kaj unu malrapide-o”. “Unu punkto kaj du flankoj” signifas: dum atako koncentri forton por unue trarompi unu punkton de la malamika pozicio, kaj sukcesinte en tio rapide grandigi la atingon, fronte ataki kaj deflanke ĉirkaŭi kaj apartigi kunage malamikojn; la “tri-tri-sistemo” signifas: dividi ĉiun subplotonon en tri malgrandajn batalgrupojn, kaj ĉiu el la grupoj havas 3-4 batalantojn kaj formas batalunuon dum atako kaj tiel batalante oni povas redukti la kvanton de vunditoj kaj mortigitoj; la “tri furioze-oj” signifas: furioze bati, furioze sturmi kaj furioze persekuti. Tiuj taktikoj estas formulitaj de Komandanto Lin per kristaligo kaj koncentro de praktikaj spertoj de la trupoj laŭ la militaj principoj de Prezidanto Maŭ. Ĉiuj ili konformas al la ĝenerala celo “**konservi sin mem kaj ekstermi la malamikon**”, kaj ankaŭ enkorpiĝis la bazan principon “**koncentri fortojn por frakasi malamikojn unu post alia**”. Uzante tiujn taktikojn en praktiko, nia trupo ofte

komplete, tute kaj ĝisfunde ekstermis la malamikojn kaj ofte la lastaj de komandantoj ĝis la ordinaraj soldatoj estis ĉiuj ekstermitaj kaj kaptitaj de ni. En ekstermado de Korpuso de Liaŭ Jaŭhiang preskaŭ ĉiuj ĝiaj altrangaj oficiroj estis vive kaptitaj. Dum pridemandado al kaptitaj oficiroj post la batalo mi demandis Li Taŭ, la estron de la Nova Sesa Armeo kiu estas unu el la tiel nomataj “kvin ĉefaj fortoj”, ĉu li estas konvinkita pri sia malvenko. La lasta respondis kolere: “Vi komunistoj estas ruzaj en batalado.” La “ruzaj” el la buŝo de la malamiko ĝuste signifas la saĝecon de la strategio kaj taktikoj de nia armeo.

Per tiuj taktikoj ni ne nur ĉiam superis la regulajn trupojn de Ĉiang Kajŝek en la batalado, sed ankaŭ akiris grandegan venkon, kiam nia kolono iris ekstermi banditojn en okcidenta Hunan en 1949. En la 22 gubernioj de okcidenta Hunan troviĝis 100,000 banditoj. La supera instanco postulis nin ekstermi ilin en tri jaroj. Iu loka “socia famulo” diris al ni: “De Ming-dinastio ne interrompiĝas la bandita katastrofo en okcidenta Hunan, estas malfacile ekstermi ilin en kvin jaroj por ne paroli pri tri jaroj.” Ni diris al li: “Sed Kompartio estas kompetenta por tio; laŭ nia opinio, ni certe povos ekstermi la banditojn en du jaroj.” Tiu famulo ridante foriris kun dubo. Dum ekstermado de la banditoj, unufleke ni senrezerve mobilizis la amasojn, nin apogis sur ili kaj forte intensigis la politikan ofensivon; aliflanke, en milita ekstermado de la banditoj ni praktikis la principon koncentri niajn fortojn por frakasi ilin unu post alia. Ekzemple,

en la malgranda gubernio Guĝang kun 50 kvadrataj kilometroj troviĝis 3,000 banditoj, ni koncentris fortojn de kvar regimentoj kaj ekstermis ilin nur en unu monato kaj duono. Samtempe kun tio ni disvolvis la spiriton de "tri furioze-oj", persekutis la armitan forton de banditoj-bienuloj, tiel ke ili falis en senelirejon kaj vive kaptiĝis aŭ devigite kapitulacis. Sub nia forta milita bato kaj politika ofensivo, disfalis la armita forto de la banditoj. Ekzemple, la pli ol 2,000 banditoj en Fenghuang-gubernio kolektive kapitulacis memvole. Tiamaniere ni komplete ekstermis la banditojn nur en unu jaro kaj du monatoj anstataŭ en du jaroj. Kaj tiam la "famulo" diris kun admiro: "La liberiga armeo estas brava kaj sagaca kaj rara en la historio, nun mi jam klare tion vidas!"

Komandanto Lin tre lertis kapti paŭzojn inter du kampanjoj por fari al siaj trupoj politikan edukon kaj militan trejnadon. La arma ordigo kondukata de Komandanto Lin karakteriziĝis per tio: unue ordigi ideologion kaj fari klasan edukon, kaj post altigo de politika kaj ideologia konscio de la trupo fari militan trejnadon, resumi kaj studi spertojn de praktika batalo, eduki la trupojn diligente kaj pene sin ekzerci prenante ekzercejon kiel batalojn. "Multe ŝvitu en la ordinara tempo por malmulte sangverŝi dum batalado" jam fariĝis amasa slogano. Pro tio ni akiris elstaran atingon en trejnado. Samtempe kun tio, ni faris kompletigon de la trupoj kaj organizan reguligon. Post ordigo kaj trejnado de unu aŭ du monatoj, multe altiĝis la politika konscio kaj milita tekniko de la trupoj. Tiel la trupoj forte volis batali kaj sur la bataloj ili vigle luktis kiel tigroj kaj ĉiam venkis. La 28-a divizio de nia deka kolono estis malnova trupo, sed en iu periodo ĝi ne povis bone konduki la batalon. Post la kunveno de militaj kaj politikaj kadroj en aprilo de 1948, Komandanto Lin speciale venigis min al si por paroli pri la ordigo kaj trejnado de la 28-a divizio. La parolado daŭris de la 11-a horo nokte ĝis la unua de la sekvanta tago. Li trafe montris, ke la problemoj de la 28-a divizio kuŝas en la malforteco de la politika kaj ideologia laboro kaj en la ĝenado de konservativa penso, se ni bone faros politikan kaj ideologian laboron

krom utiligo de aliaj faktoroj, ni certe venkos en batalo. Li diris: "Militado ja dependas de politiko, kaj trupo sen politiko ja ne povas bone militi." Li opiniis, ke la konkretaj metodoj kaj paŝoj en la ordigo kaj trejnado devas esti plene mobilizi la amasojn per klasa eduko, disvolvi kritikon kaj memkritikon, komplete malkovri la problemojn de la trupo en la nebone faritaj bataloj, por ke ĉiu el la kadroj kaj batalantoj konu la mankojn de sia trupo kaj la amasoj elpensu metodojn kaj elmetu opiniojn por forigo de tiuj mankoj. En tiuj laboroj plej grave estas fortigi la laboron de la partiaj filioj. Se mobiliziĝas la partianoj kaj altiĝas ilia konscio, do leviĝas ankaŭ la amasoj sub ilia influo. Laŭ la instrukcio de Komandanto Lin, ni koncentris la 28-an divizion en Kajjuan por unumonata ordigo kaj trejnado, kaj post tio tute noviĝis la fizionomio de la trupo. En la obstrukca batalo de Hejŝan tiu divizio estis asignita por defendo de la ĉefa pozicio kaj tre bone plenumis la taskon. Kvankam la ĉefaj fortoj de la malamikoj la Unua Nova Armeo, la 49-a Armeo kaj la 207-a Divizio alterne faris frenezajn atakojn al nia pozicio, kiu multfoje perdiĝis, tamen finfine nia 28-a divizio obstine tenis ĝin.

La strategia penso de Komandanto Lin, lia gvida penso koncentri fortojn por ekstermi malamikojn, mobilizi amasojn, fondi bazlokojn en gvidado de la tuta popola Liberiga Milito en Nordoriento kaj ekstermo de ĉiuj malamikoj, ĉio ĉi tio rezultis el tio, ke Komandanto Lin profunde kaj komplete studis la penson de kamarado Maŭ Zedong kaj li estas la plej sukcesa modelo en ĉiama alta tenado de la granda ruĝa standardo de Maŭzedongpenso, preno de Maŭzedongpenso kiel orientilo por agado kaj uzado de ĝi en kombino kun la tiamaj specifaj cirkonstancoj de Nordoriento. La granda venko de la popola Liberiga Milito en Nordoriento sub la gvido de Komandanto Lin estas la granda venko de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso. Tiuj faktoj diras al ni: Kiu firme praktikas Maŭzedongpenson, tiu venkas; kaj kiu ĝuste uzas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson, tiu povas esti nevenkebla. La historio pruvis, ke Komandanto Lin ĝuste estas tia homo. Li estas la

plej firma kaj fidela plenumanto de la ĝusta linio de la Partio kaj Maŭzedongpenso.

MILITO KAJ PACO

La malamiko estas lupo en naturo, sed iam ĝi sin ŝajnigas “ŝafido” por paralizati la singardemon de homoj, kaj profitante vian malatentecon, ĝi povas subite sin ĵeti sur vin por morde rompi vian gorĝon. Estas facile distingi ferocan lupon, sed malfacile distingi lupon en ŝaffelo. Post la finiĝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, Ĉiang Kajŝek jam decidis lanĉi enlandan militon, sed por kovri sian lanĉon de enlanda milito kaj gajni tempon por movi siajn fortojn, li multfoje uzis artifikaĵojn de “paco”, ekzemple, li hipokrite kontraktis “pacan interkonsenton”, deklaris “ordonon pri militĉesigo”, “denove emfazis la validecon de la ordono pri militĉesigo”, eĉ en la antaŭvespero de sia pereco li ankoraŭ proponis “pacan intertraktadon” k. a. Estis nemalfacile travidi la ruzojn de Ĉiang Kajŝek, sed ja troviĝis naivuloj, kiuj iam havis iluzion pri li, pensante, ke venos paco, se oni estas “toleremaj kaj cedemaj” al li.

Komandanto Lin opiniis, ke iluzio pri paco kaj paraliziteco de singardemo estas serioza danĝero en batalo kontraŭ la malamiko. Li opiniis, ke nepre necesas eduki la tutan armeon kaj popolon rompi la iluzion pri paco. Jam en 1946 li akre montris: “La vorto ‘paco’ absolute ne ekzistas en la kapo de Ĉiang Kajŝek, kiu ĝin uzas hazarde nur kiam li faras trompon.” “La nordorienta popolo devas altigi sian singardemon kaj ne esti trompita de li foje kaj refoje, devas firme sin gardi kontraŭ surprizatako de Ĉiang Kajŝek sub la kamuflo de ‘paco’. Nun, nur se ni unuanime kaj firme kontraŭstaras, ne donante al la nin atakantaj trupoj de Ĉiang Kajŝek tempon por reguligo, replenigo de la anaro kaj aranĝo de fortoj, lacigas, batas kaj ekstermas ilin, tiam ni povas haltigi kaj frakasi novajn atakojn de Ĉiang Kajŝek.”

Farante edukadon al trupoj, laŭ la penso de Prezidanto Maŭ Komandanto Lin ripetade emfazis: La batalo inter ni kaj Ĉiang Kajŝek estas batalo inter du kontraŭstaraj klasoj. La kontraŭdiro estas absoluta; milito estas

neevitebla kaj kompromiso estas provizora. Ĉiang Kajŝek “ne povos fermi siajn okulojn post sia morto”, se li ne ekstermos la Komunistan Partion, lia tiel nomata “paco” estas efektive rimedo por ekstermi nin. Peti pacon antaŭ la pafilo de Ĉiang Kajŝek neniom diferencas de “peti de tigro ĝian felon”, kio nur portos perdojn al la afero de la Partio. Nur se ni batalos ĝis la fino kaj faligos Ĉiang Kajŝek, tiam estos paco en nia lando; se imperiismo aŭdacos lanĉi militon, ni nepre batalos firme kontraŭ ĝi; nur kiam en la mondo ne estos imperiismo, venos eterna paco de la mondo. La okupo de nia armeo estas armita batalo, ni devas starigi la penson ne kunekzisti kun la malamiko, devas nin prepari por batali ĉiutage, ĉiumonate kaj ĉiujare kaj batali ĝis la fina venko. Ni devas ĉiam akriigi nian glavon brila, sed ne lasi ĝin rustiĝi.

La penso de Komandanto Lin pri gajno de paco per batalo ja profunde enkorpigis la grandan penson de Prezidanto Maŭ “**opozicii kontraŭrevolucion militon per revolucia milito**”, kaj fariĝis forta armilo por eduki la popolon kaj armeon. Ĉar ni faris multan ideologian edukadon kaj Ĉiang Kajŝek foje-refoje disŝiris persone sian senvaloran kamuflon de “paco”, kaj la faktoj edukis la homojn, tial rapide nuligi la iluzion pri paco kaj paraliziteco de singardemo kontraŭ la malamiko kaj firme stariĝis la penso konduki revolucion batalon ĝis la fino. Mi opinias, ke la penso pri gajno de paco per batalo havas edukitan signifon ankaŭ en la nuna tempo. La naturo de imperiismo ja estas agreso kaj milito; kiajn manovrojn ĝi ludos, neŝanĝebla restos ĝia naturo. Lupo restas ĉiam lupu kaj ĝi neniam povas fariĝi ŝafo. La imperiistoj ja ne formetis sian buĉistan glavon, sed daŭre koncentras fortojn, faras armeekspansion kaj militpreparon, plenforte disvolvas raketan kaj nuklean fortojn kaj utiligas ĉiun ŝancon por lanĉi agresadon kaj atakon al socialismaj landoj por ilin ekstermi. Tial ni nepre devas ĉiam teni altan singardemon, forĵeti iluzion pri paco kaj paralizitecon de singardemo kontraŭ la malamiko kaj senĉese potencigi niajn fortojn, precipe la armitajn fortojn. Nur kiam niaj fortoj estas senkompare potencigitaj, ni povas defendi la sekurecon de nia socialisma

patrolando. Ju pli potencigas niaj fortoj, des pli imperiismo ne kuraĝas lanĉi militon, se imperiismo aŭdacos histerie lanĉi militon, ni havos sufiĉan forton por ekstermi militon per milito, forigi imperiismon de sur la terĝlobo kaj gajni eternan mondpacon.

RIGORA AL SI MEM KAJ AFABLA AL ALIAJ

Iam mi pensis: Kial Komandanto Lin ĉiam estas ĝusta? En kio li diferencas de aliaj? Post atenta observado mi trovis en li jenajn elstarajn karakterizaĵojn: Komandanto Lin estas homo pensema kaj diligenta en studo, strikte ligiĝanta kun la amasoj, plej rigora al si mem kaj plej kapabla lerni de Prezidanto Maŭ.

Mi vidis Komandanton Lin minimume dekojn da fojoj, kaj preskaŭ ĉiufoje, kiam mi vidis lin, li estis leganta, escepte se li kunvenis. Lia ĉambro abundis je libroj, kaj li ĉiam tenis libron en la manoj. Iufoje, mi venis al Komandanto Lin por peti de li instrukcion pri iu afero. Veninte en la ĉambron mi vidis ke Komandanto Lin legas libron rajdante sur benko, sin klinante, ĉar li laciĝis pro legado sidante kaj ŝanĝis sian sidmanieron. Kompare malbona estis la sano de Komandanto Lin. En la Kampanjo de Pinghingguan-pasejo li persone iris al la fronto por komandi la batalon kaj ricevis seriozan vundon. Sed dum multaj jaroj li ne nur sindone laboris, sed ankaŭ obstine persistis en studo. Kamaradoj, kiuj ofte kunestas kun li, diris, ke Komandanto Lin ofte legas ĝis la profunda nokto, eĉ forgesante dormon kaj manĝon. La plejparto de libroj, kiujn li legis, estas verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kaj en- kaj eksterlandaj verkoj politikaj kaj militaj de antikveco kaj nuntempo. Komandanto Lin legis ilin ne por ĝuado, sed por kombini "studon kun apliko" kaj solvi problemojn per teorio kaj transformi ĉiujn utilajn spertojn de la aliaj en siajn proprajn. Do estas ne strange, ke li havas riĉan scion kaj ĝustajn opiniojn.

La laborstilo de Komandanto Lin estis tre praktika, li tre atentis pri esplorado kaj enketado. Li ĉiam klopodis por plej eble koni la staton de la malamiko, kaj en gravaj

kampanjoj kaj bataloj li ofte iris persone al la fronto por koni la staton de la malamiko kaj esplori la poziciojn kaj kune kun gvidantoj de la trupo studis batalplanon kaj decidis dispozicion de la batalo kaj kampanjo. Komandanto Lin ĉiam atentis pri profundigo en amasojn por aŭskulti iliajn opiniojn. Li estis homo tre modesta kaj afabla kaj ne havis sinjoran agmanieron. Interparolante kun subaj kamaradoj, li ĉiam atente aŭskultis iliajn opiniojn kaj neniam facilanime interrompis alies parolon. Kiam li rimarkis en la parolo ion ne ĝustan, li ĉiam tion montras kun interkonsiliĝa tono kaj poste per Maŭzedongpenso sisteme faras detalan kaj trafan analizon pri la problemo, de ideologia principo ĝis specifaj flankoj, ĝis kiam vi tion komprenas. Iu malgranda afero tre kortuŝis min. Mi ofte vizitis Komandanton Lin, sed ĉiufoje, post akceptado de mi, li senescepte persone akompanis min ĝis la pordo malgraŭ sia okupateco. Kelkiam mi sentis maltrankvilon kaj konsilis lin ne eliri, sed li ĉiam insistis en tio. Same kiel min, li tiel traktis ankaŭ aliajn. Ĉu tio estis nur por ĝentileco? Ne, tio plene montris la egalecan spiriton de Komandanto Lin en traktado de aliaj. Mirinde malluksa estis la vivmaniero de Komandanto Lin. Lia "lunĉo" estis rostita sojo, kaj ankaŭ per ĝi li regalis gastojn. Ankaŭ tre ordinara estis lia manĝaĵo eĉ kiam ĉe li estis gasto. Dum multaj jaroj mi vidis, ke li ĉiam estis en griza kotonŝtofa uniformo aŭ en maldelikata drapa uniformo. Ankaŭ en 1958, kiam mi vidis Komandanton Lin en Kunming, li estis en tre ordinara malnova nigra drapa uniformo, kies maniko eĉ surhavis flikaĵon. Komandanto Lin ĉiam dividis kun la batalantoj dolĉon kaj amaron, pene laboris kun eksterordinara persistemo. Dum kampanjo, li ofte restis tutnokte en la komandejo sen dormo kaj ripozo. Komandanto Lin ja estas homo sinforgese klopodanta por la bono de la kolektivo. Kaj li, kiel Fan Ĝongjan de Song-dinastio diris, "zorgas pri la popolo ĉiam antaŭ aliaj, sed la frukton ĝuas ĉiam post aliaj".

Komandanto Lin estas tre rigora al si mem. Tio montriĝis ĉefe ne en interrilato kun aliaj kaj la ĉiutaga vivo, sed en lia spirito de memkri-

tiko, kiu profunde min kortuŝis. En la somera ofensivo de 1947, nia deka kolono kaj aliaj kolonoj laŭ ordono devis konkeri iun urbon firme defendatan de la malamiko. En la batalo ni mortigis, vundis kaj kaptis pli ol 10,000 malamikojn, sed poste, pro alrapido de helpantaj malamikoj, la urbo ne estis konkerita. Pri la malsukceso de tiu kampanjo kulpis ĉefe la fronta komanda organo kaj la komanda organo de la kolono. La kaŭzoj de la malsukceso kuŝis en la dispozicio kaj taktikoj de la batalo, ekzemple: nesufiĉe grandaj estis la koncentrita forto kaj paffajro kaj nesufiĉe efika estis la haltigo de la helpantaj malamikoj ktp. En la kunveno de kadroj kunvokita de la stabo post la batalo, Komandanto Lin prenis sur sin la tutan respondecon. Trifoje li stariĝis kaj sincere faris memkritikon: “Ne vi sed mi devas respondeci pri la malsukceso de la atako al la urbo. Ĉefe, mi ne sufiĉe konis la staton kaj tro rapide faris la decidon. Pli bone estus unue sieĝi la urbon kaj bati la helpantajn malamikojn anstataŭ ataki. Se ni unue ekstermus la helpantajn malamikojn kaj atakus la urbon poste, ni certe ĝin konkerus. Cetere, en tiu batalo malkovriĝis la malforteco de nia taktiko pri atako al forte defendata urbo, kio estas nesufiĉe atentita de mi en ordinara tempo.” Tia rigoreco de Komandanto Lin al si mem tre produnde kortuŝis nin. Mi opiniis ke ne Komandanto Lin sed ni devis respondeci pri la rekta komando, sed por akcepti tiujn spertojn kaj lecionojn, li elpaŝis por respondeci pri ĉio, ĝuste por antaŭenpuŝi la studon de taktikoj pri atako al forte defendata urbo al la nova etapo. La alta atento de Komandanto Lin pri tiu problemo ĝuste estis la komenco de la solvado de serio da problemoj taktikaj en atako al forte defendata urbo kaj antaŭdiris la pereon de la malamikoj. La modela ago de Komandanto Lin donis al mi kaj kadroj de la trupo profundan edukon pri memkritiko. Post mia komuniko de liaj vortoj al la trupo, kadroj amase faris memkritikon kaj kuraĝe prenis sur sin la respondecon pri la afero. Post tio memkritiko fariĝis moro inter la kadroj de la trupo, studado pri taktikoj floris ĉie kvazaŭ floroj post pluvo, kaj ĉie regis vigeleco. De post tiam Komandanto Lin klopodis por

ellaboro de taktikoj pri atako al forte defendata urbo kaj elmetis unu post alia taktikojn kiaj “kvar rapide-oj kaj unu malrapide-o”, “kvar grupoj kaj unu trupo”, kiuj fine formis serion de taktikoj por ataki fortikaĵon. Nur post ok monatoj la supre dirita urbo estis konkerita de nia armeo en 23 horoj kaj pli ol 10,000 malamikoj estis ĉiuj ekstermitaj. Post tio ĉiuj grandaj urboj okupitaj de la malamikoj en la Nordoriento estis konkeritaj unu post alia sub la direktado de taktikoj de Komandanto Lin pri atako al forte defendata urbo.

Komandanto Lin ĝuas altan prestiĝon en la armeo kaj inter la popolamasoj de la Nordoriento pro sia eksterordinara talento, riĉa scio kaj pro sia modesteco, simpleco, rigoreco al si mem kaj afableco al aliaj kaj grandanimeco. La tuta armeo, ĉu kadroj, aŭ batalantoj ĉiuj deziris vidi lin kaj proksimiĝi al li. La kadroj de nia kolono konkure petis por iri al la ĉefstabo por kunveni, ĉar tie ili povis vidi Komandanton Lin kaj povis pli multe koni la instrukciojn de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj ĉiu vorto kaj ĉiu ago de Komandanto Lin povis lernigi al ni multe da novaj kaj valoraj scioj. Iri al la ĉefstabo por kunveni kaj vidi komandanton Lin ja signifis por “peti spertojn” kaj “akiri trezoron”. Antikvuloj diris: “fariĝi sukcesulo je la aĝo de tridek jaroj.” La kvar jaroj sub la gvido de Komandanto Lin estis mia maturvira aĝo de iom pli ol tridek jaroj. La sinceraj instruoj de Komandanto Lin donis al mi grandan edukon por mia fundamenta klasa starpunkto, vidpunkto kaj metodoj kaj plialtigis mian konscion. Kaj nun tiuj instruoj de li ankoraŭ donas grandegan influon al mia penso kaj gvidas mian agon. Komandanto Lin estas ne nur nia gvidanto ĉiam ĝusta kaj saĝa, sed ankaŭ nia bona instruisto kaj amiko. Mi ofte kun emocia koro kare memoras la neordinarajn kvar jarojn de la kvardekaj jaroj.

(Fino)

* La artikolo estis publikigita en 1960. La aŭtoro kamarado Ĝou Ĉiping estas elektita kiel membro de la Centra Komitato de la Partio en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.



Kiam la komandantoj kaj batalantoj de la Ruĝa 9-a Roto plenumas la taskon por subteni maldekstrulojn en la Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun, la partia filio de la roto ofte kunvenas por studi kiel profunde disvolvi la batalon, kritikon kaj reformon.

Ruĝa 9-a Roto—Modelo de Studo de Verkoj de Prezidanto Maŭ

LA heroa titolo de la Ruĝa 9-a Roto estas nedisigeble ligita kun la saĝaj gvido kaj komando de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin.

Aktive respondante al la batalalvoko de Vicprezidanto Lin, ke “oni nepre devas efektive posedi Maŭzedongpenson”, kaj ĉiam sekvante lian instrukcion “Studu la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultu liajn instruojn, agu laŭ liaj instrukcioj kaj estu liaj bonaj batalantoj”, la kadroj kaj batalantoj de la Ruĝa 9-a Roto levis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭ-

zedongpenso al nova nivelo. Ekde la jaro 1961, kiam la tuta armeo disvolvis la movadon de kreado de rotoj kun kvar bonoj, la Ruĝa 9-a Roto estis elektita kiel tia ĉiujare; kaj en julio, 1964, ĝi estis titolita de la Ministerio de Nacia Defendo “Ruĝa 9-a Roto Modelo de Studo de Verkoj de Prezidanto Maŭ”. En la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio la Ruĝa 9-a Roto starigis novajn meritojn por la popolo.

La Ruĝa 9-a Roto estas unu el la rotoj de la Ruĝa Armeo persone starigitaj de Prezidanto Maŭ. Ĝi ĉiam sekvis Prezidanton Maŭ en la bataloj de

la Aŭtunikolta Ribelo ĝis la bataloj en Gíng-gang-montaro kaj de la Longa Marŝo de 25,000 lioj ĝis marŝo al la plejfronto de la Kontraŭjapana Rezistmilito. En la plej malfacila tempo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, sub la rekta komando de Vicprezidanto Lin, tiu roto partoprenis la batalon ĉe la pasejo Pinghinguan faman ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en la tuta mondo, kaj estis glorie honorita per la titolo "Sturma Roto en la Batalo ĉe Pinghinguan". Dum la periodo de la Liberiga Milito, la kamaradoj de la Ruĝa 9-a Roto kvankam militis jen en nordo kaj jen en sudo, kaj milojn da lioj fore de Prezidanto Maŭ, tamen ilia koro ĉiam proksime sekvis Prezidanton Maŭ sen ioma disiĝo kaj marŝis de venko al venko sub la direkto de Maŭzedongpenso. Retrorigardante la brilajn vojojn, kiun ili venke trapasis en batalo kaj kreskado sekvante Prezidanton Maŭ, la kamaradoj de la roto diris kun plena emocio: "En daŭro de dekoj da jaroj ni kreskis sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ. Nur dank' al Prezidanto Maŭ, nia Ruĝa 9-a Roto fariĝis tia, kia nun ĝi estas. Ni nepre restos ruĝa roto por ĉiam fidela al Prezidanto Maŭ!"

En oktobro, 1960, la rezolucio de la Plivastigita Kunveno de la Komisiono pri Militaj Aferoj de

la Centra Komitato de KPC, ellaborita sub la persona prezido de Vicprezidanto Lin, havas grandan epokfaran signifon en la historio de nia armeo. Kiam la rezolucio atingis la Ruĝan 9-an Roton, la kamaradoj de la tuta roto legadis ĝin fojon post fojo. Ĉiuj diris, ke la rezolucio ja eldiris kion ili havas en sia koro, kaj montris al ili la direkton. Same kiel ĉiuj aliaj rotoj en la armeo, sub la kuraĝigo de la batalalvoko de Vicprezidanto Lin, la Ruĝa 9-a Roto levis ardan tajdon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Ĝiaj kadroj kaj batalantoj peneme studis la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj feliĉe kreskis sub la sunbrilo de Maŭzedongpenso.

Sed Luo Ĵujking, kontraŭrevolucia reviziisto enŝteliĝinta en la Partion, heredanta la karieron de Peng Dehuaj, alia kontraŭrevolucia reviziisto, ĝisoste malamis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en la armeo. Utiligante sian uzurpitan gravan postenon, li tuforte faris subfosadon, intencante strangoli la grandan amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Veninte al la trupo, al kiu apartenas la Ruĝa 9-a Roto, la kontraŭrevolucia reviziisto Luo Ĵujking kriaĉis, ke "oni ne devas trejni trupojn nur per libroj". Krome



Li Ŝuhaj (dekstre), la vicsekretario de la partia filio de la Ruĝa 9-a Roto, intime interparolas kun membroj de la revolucia komitato de la branĉa fabriko por ĝisado de la Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun.

li difinis, ke la tempo por milita trejnado en ĉiu tago okupu sep horojn kaj la restan tempon oni uzu por purigi armilojn kaj sinekzerci en pafado". Per tio li vane provis subfosi la amasan movadon de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la armeo.

En tiuj tagoj kiam la kontraŭfluo atakis ilin, la kamaradoj de la Ruĝa 9-a Roto denove studis la rezolucion de la Plivastigita Kunveno de la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPCĈ ellaboritan sub la persona prezido de Vicprezidanto Lin kaj ripetade cerbumis pri la problemo. Ili diris: Ni devas firme respondi al la batalalvoko de Vicprezidanto Lin kaj vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson. Estas absolute nepermeseble, ke Luo Ĵujking sukcesu en la intrigo subfosi nian studon de Maŭzedongpenson.

La firma kredo al Prezidanto Maŭ kaj al Maŭzedongpenson kuraĝigis la kadrojn kaj batalantojn de la Ruĝa 9-a Roto!

Luo Ĵujking ne donis al la trupoj tempon por studi verkojn de Prezidanto Maŭ, sed la partia

La partia filio de la roto ofte edukas siajn novajn partianojn ĉiam teni la bonan stilon strikte ligiĝi kun la amasoj. Jen la nova partiano Vang Kekian (la dua de maldekstre) laboras kune kun laboristoj.



filio de la Ruĝa 9-a Roto difinis specialan tempon por tio kaj certigis, ke la difino estas neniam ŝanĝebla.

Luo Ĵujking insultis la kamaradojn, kiuj aktive studis verkojn de Prezidanto Maŭ, dum la Ruĝa 9-a Roto kulturis kaj elstarigis aktivulojn de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj vaste laŭdis iliajn bonajn farojn, kaj la partia filio de la roto akceptis novajn kompartianojn kaj elektis kadrojn el tiuj aktivuloj por ke la gvidanteco de la roto estu ĉiam en la manoj de la batalantoj fidelaj al Prezidanto Maŭ. Apogante sin sur Maŭzedongpenson, la Ruĝa 9-a Roto faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisto Luo Ĵujking kaj frakasis lian intrigon subfosi studon de Maŭzedongpenson.

Someron de 1961, la respektate amata Vicprezidanto Lin venis al la trupo al kiu apartenas la Ruĝa 9-a Roto. Li tre zorgis pri la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenson en la trupo. Li sinsekve akceptis gvidantajn kamaradojn de la trupo kaj kamaradon Sun Caj, estron de la Ruĝa 9-a Roto kaj detale informiĝis pri la studado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Vicprezidanto Lin tre ĝojis, kiam li aŭdis, ke la kadroj kaj batalantoj aktive kaj entuziasme studas verkojn de Prezidanto Maŭ. Post tio Vicprezidanto Lin faris ekstreme gravan instrukcion al ili, dirante: "Bona roto estas kvazaŭ lernejo, kaj la 9-a roto ja estas bona lernejo." Tuj kiam la instrukcio de Vicprezidanto Lin atingis la roton, ĉiuj kamaradoj de la roto ĝojkriis, eksaltis kaj emociiĝis ĝis larmo: Nia respektate amata Vicprezidanto Lin, en la pasintaj militaj jaroj, sub la persona gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj via rekta komando, ni batalis kaj kreskis. Kiam nin venenis la burĝara milita linio, estis vi, kiu instruciis al ni vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson, por ke ni firme marŝu sur la vojo de Maŭzedongpenson; nun, kiam ni alfrontas malhelpon kaj subfosadojn en viva



Vang Defu (la dua de dekstre), aktivulo de la roto en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj reprezentanto ĉeestinta la Naŭan Kongreson de la Partio, petas pri opinioj profundigante en laboristajn amasojn.

studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, vi denove donas al ni senkompare potenca forton. La kamaradoj de la tuta roto diris samvoĉe: Prenante Vicprezidanton Lin kiel brilajn ekzemplon, ni estos ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ, al Maŭzedongpenso kaj al lia proletara revolucia linio, kaj alte tenos la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, por ke ĝi ĉiam flirtu super la pozicio de la Ruĝa 9-a Roto.

Kiam rekrutoj venas al la Ruĝa 9-a Roto, antaŭ ĉio la partia filio organizas ilin por studi la brilajn verkojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ *La Batalo en Gingga-montaro, Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon* kaj la “tri popularajn artikolojn”, kaj rakontis al ili la batalan vojon, kiun trairis la Ruĝa 9-a Roto kaj kiel oni pene studis en la roto verkojn de Prezidanto Maŭ, por ke la rekrutoj heredu la revolucionan spiriton de Gingga-montaro. Tiel la novaj batalantoj ĉiuj faras decidon heredi la gloran revolucionan tradicion de Gingga-montaro por aldoni plian gloron al la heroa ruĝa standardo de la roto! Ĉiujare, en la 1-a de aŭg., la festa tago de la armeo, la Ruĝa 9-a Roto solenas ĝin kaj invitas antaŭajn gvidajn kamaradojn de la roto dum la tempo de Ruĝa Armeo por rakonti pri la revolucionaj tradicioj por ke la batalantoj same kiel la antaŭuloj en la Ruĝa Armeo havu la heroan spiriton timi nek malfacilojn nek morton.

La revolucia spirito de Gingga-montaro kuraĝigas la batalantojn al penema sinhardado. Ĉiufoje, kiam la batalantoj renkontas malfacilaĵojn dum plenumado de peniga tasko, ili ĉiam diras: Ĉu tio estas eĉ pli malfacila ol la batalo en Gingga-montaro? Ĉu tio estas eĉ pli malfacila ol la Longa Marŝo de 25,000 lioj? Iufoje ili iris por fari produktajn laborojn en pluvo kaj devis trapasi riveron. Sed la rivero ŝvelis kaj la torentanta fluo forportis la ponton super ĝi. Kion fari? La gvidanta kamarado de la roto diris: “La Ruĝa Armeo siatempe povis konkeri Dadu-riveron, kion povas signifi por ni tiu ĉi rivereto. Ni prunteprenu kelkajn tabulojn de komunumanoj trans la rivero por konstrui ponton”. Tion dirinte li demetis siajn vestojn, saltis en la akvon kaj naĝis al la kontraŭa bordo. Lin sekvis ankaŭ kelkaj batalantoj. Kiam ili alportis tabulojn, la rivero ŝvelis ankoraŭ pli alte kaj ankaŭ la pontfostoj enakviĝis. La kadroj kaj batalantoj sentime staris en la akvo profunda ĝis la brusto kaj formis provizoran ponton, subtenante la tabulojn per siaj ŝultroj, por ke la batalantoj trapasu la riveron sur ĝi.

Alian fojon la roto iris 70 kilometrojn fore por helpi fratan trupon en plenumo de konstruaj taskoj. Kiom laciĝis la batalantoj, post kiam ili piediris 50 kilometrojn. Ĝuste en tiu tempo kuris al ili renkonte kelkaj kamionoj, kiujn alsendis

la frata trupo por veturigi ilin. La kamaradoj de la Ruĝa 9-a Roto tre kortuŝiĝis de tio, sed neniu el ili volis suraŭtigi. Kun dankoj ili rifuzis tion kaj daŭrigis la marŝadon per grandaj paŝoj, kantan- te la revolucian kanton *La Ruĝa Armeo Ne Timas Longan Militiron*, kaj triumfe atingis la celokon.

La partia filio de la Ruĝa 9-a Roto edukas la batalantojn laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ: **“Nepre ne forgesu la klasbatalon”**, por altigi ilian klasbatalan konscion. Foje rotestro Sun Caj babilis kun iu nova batalanto. Kiam ilia interparolo tuŝis la ekspluaton faratan de bienuloj al malriĉuloj en la malnova socio, tiu ĉi juna batalanto devenanta de malriĉkampana familio demandis naive: **“Ĉu ĉiuj bienuloj ekspluatas?”** Tiu ĉi demando vekis grandan atenton ĉe la rotestro. La partia filio de la roto speciale kunsidis por diskuti tiun demandon kaj decidis disvolvi amasan klasan edukon laŭ la instrukcio de Vicprezidanto Lin: **“Se oni ne komprenas, kio estas klaso kaj kio estas ekspluato, do oni ne povas kompreni, kio estas revolucio”**. Utiligante la tempon de kampado, ili faris klasan enketon kaj edukis per tio la batalantojn bone koni ekspluatatan naturon de la bienuloj kaj kapitalistoj. Ili invitis la maljunan dungiton Fan, kies patro kaj avo ankaŭ laboris kiel dungitoj

por bienuloj, por rakonti al la batalantoj sian familian historion. La maljunulo rakontis pri sia 37-jara mizera vivo de dungito ĉe bienuloj kaj sia familia historio plena de sango kaj larmoj. La tri generacioj de lia familio laboris kiel brutoj kaj sate suferis ĉiajn suferojn. Nur kiam Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio venis, li fine liberiĝis. El la dekoj da bienuloj, por kiuj laboris la tri generacioj, troviĝis neniu bienulo kiu estis **“bonkora”** kaj ne ekspluatis. La juna batalanto diris: **“Nun mi komprenas, ke ĉiuj bienuloj en la mondo estas same malbonaj kaj ĉiuj korvoj same nigraj.”**

La familia historio de avo Fan plena de sango kaj larmoj donis al la batalantoj ekstreme profundan klasan edukon.

Laŭ la instruado de Prezidanto Maŭ, la partia filio de la roto konstante faras edukon pri preparo kontraŭ milito, por ke la batalantoj de la tuta roto plene konu la reakcian naturon de imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj, forligu sian koncepton pri klasoj kaj klasbatalo kaj kun centobla singardemo tenu firme pafilojn en la manoj por esti pretaj ekstermi la malamikojn, kiuj aŭdacos en- trudiĝi.

Diverslandaj Popoloj Aktive Eldonas Verkojn de Prezidanto Maŭ

KUN la vigla disvolviĝo de la revoluciaj movadoj de la tutmonda proletaro kaj revoluciaj popoloj de ĉiuj landoj, pli kaj pli multaj revoluciaj popoloj aktive tradukas kaj eldonas verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj entuziasme propagandas Maŭzedongpenson.

Laŭ nekompleta statistiko, ĝis junio 1969, verkoj de Prezidanto Maŭ estis aperigitaj en 70 lingvoj kaj pli ol 1,100 eldonoj en 60 landoj kaj regionoj.

Depost la disvolviĝo de la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando tre multe kreskas la bezono de verkoj de Prezidanto Maŭ ĉe fremdlandaj revoluciaj popoloj. La revoluciuloj kaj

progresemaĵoj organizoj de multaj landoj aktive tradukas kaj eldonas verkojn de Prezidanto Maŭ venkinte diversajn malfacilojn. Multaj fremdlandaj revoluciuloj fiere diris: **“Propagandi Maŭzedongpenson estas devo kaj respondecado de ĉiuj revoluciuloj”**, **“lukti dum la tuta vivo por propagandi kaj defendi Maŭzedongpenson estas nia plej granda gloro”**. Ĝis junio 1969, aperis en 35 landoj 52 eldonoj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* tradukita en 32 lingvoj. *La Elektitaj Militaj Verkoj de Maŭ Zedong* estas tradukita kaj eldonita en 4 lingvoj eksterlande. Krome, aperis 1046 eldonoj de verkoj de Prezidanto Maŭ unuopaj aŭ kunmetitaj, kiaj la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, *Elektitaj Legaĵoj el Verkoj de Maŭ Zedong*, *Analizo de*

la Klasoj en la Ĉina Socio, Parolado ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, Pri Praktiko, Pri Kontraŭdiro kaj Pri Longdaŭra Milito.

La *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiun la revoluciaj popoloj de la tuta mondo nomas "ruĝa trezora libro", disvastiĝis en diversaj regionoj de la tuta mondo. En la lastaj tri jaroj, de junio 1966 ĝis junio 1969, tiu ĉi "ruĝa trezora libro" aperis en 25 landoj kaj regionoj en 25 lingvoj, inkluzive la anglan, francan, hispanan, germanan, italan, grekan, danlandan, nederlandan, norvegan, islandan, finnlandan, araban, laosan kaj hebrean, kaj en 51 eldonoj. Albanio aperigis pli ol 10 kolektojn de vortoj de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong *Pri Proletara Diktaturo, Pri Elstarigo de Politiko, Pri Klasbatalo* kaj aliaj. Hindaj revoluciuloj aperigis la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en 7 lingvoj kaj 9 eldonoj. La japanaj amikoj aperigis *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* en 8 eldonoj, inkluzive eldonon de reduktita formato, de lernolibra formo kaj plivastigita parto. En la laste nomita eldono, aperinta je la komenca jaruono de 1969, estas aldonitaj la grava surskribo de Prezidanto Maŭ dediĉe al japanaj amikoj kaj multaj gravaj paroladoj de Prezidanto Maŭ al la japana popolo de post 1960. Por kontentigi la bezonon de la japanaj revoluciaj amasoj la Oriento-Librejo de Japanio eldonis *Vortojn de Prezidanto Maŭ* en kalendara formo, kiu povas esti pendigata sur muro. Iu progresema librejo de Svedio tradukis kaj eldonis *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* en la sveda lingvo, kiu estas varme akceptata de la revoluciaj legantoj. En malpli ol unu jaro, ĝi estis 4-foje reelonita.

Krome, la revoluciaj popoloj de 8 landoj aperigis la libron *Prezidanto Maŭ pri Popola Milito* en la

angla, nepala, malajalama, telugua k. a. sume 9 lingvoj kaj 11 eldonoj. La revoluciaj popoloj de tri aliaj landoj aperigis la libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ pri Junulara Movado* hispane kaj itale en 3 eldonoj. La revoluciuloj de iuj aliaj landoj eldonis vortojn de Prezidanto Maŭ pri konstruado de la partio kaj pri aliaj.

La "tri popularaj artikoloj", el kiuj radias briloj de komunisma penso, ne nur estis publikigitaj plentekste en progresemaj ĵurnaloj kaj gazetoj de iuj landoj en Azio, Latinameriko, Oceanio kaj Eŭropo, sed ankaŭ tradukitaj en 14 lingvojn de la revoluciaj popoloj de 14 landoj, inkluzive Hindion, Cejlonon, Birmon, Italion, Ĉilion kaj Ekvadoron kaj aperigitaj en 23 eldonoj. Albanio eldonis sub la titolo *Servu al la Popolo*, 7 brilajn artikolojn de Prezidanto Maŭ, inkluzive la tri popularajn artikolojn.

Laŭ la bezonoj de revoluciaj taskoj, la revoluciuloj de iuj landoj tradukis kaj eldonis diversajn koncernajn verkojn de Prezidanto Maŭ en unuopaj aŭ kunmetitaj eldonoj. En la lastaj pli ol du jaroj, spite al la furiozaj subpremado kaj persekutado de la reacia registaro, la hindaj revoluciuloj tradukis kaj eldonis verkojn de Prezidanto Maŭ en la hindia, bengala, pengaba, tamila k. a. sume 8 lingvoj kaj 76 eldonoj. En Cejlono, ekde la jaro 1967, oni tradukis kaj eldonis verkojn de Prezidanto Maŭ en 59 eldonoj. En Francio, la *Elektitaj Artikoloj de Maŭ Zedong* en poŝformato estas tre bonvena al la legantoj, kaj ĝi enhavas ankaŭ 18 poemojn de Prezidanto Maŭ. La ekvadoraj revoluciuloj eldonis la unuan kaj duan numerojn de la biblioteko de *Maŭzedongpenso*. La peruaj revoluciuloj eldonis mimeografe verkojn de Prezidanto Maŭ en 25 eldonoj sub malfacilaj kondiĉoj.

Laboristoj de la Oriento-Librejo de Japanio broŝuras la libretojn Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong.



En Batalo Ili Lernas

Maŭzedongpenson

SUR la vasta tero de sudorienta Azio, multaj revoluciuloj kaj popolaj batalantoj, kiuj heroe faras revoluciajn armitajn luktojn, diligente lernas kaj aplikas Maŭzedongpenson lige kun la konkretaj kondiĉoj de siaj landoj. El sia praktiko de bataloj, ili komprenas ke Maŭzedongpenson estas potenca armilo por venki malamikojn.

SERVI AL LA POPOLO

En sia malfacila batala vivo, multaj batalantoj de popolaj armitaj fortoj en landoj aŭ regionoj en sudorienta Azio diligente lernas la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ. Ili disvolvis la revolucionan spiriton servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve, sin ĵetis en ardan revolucion armitan batalon kaj disvolvis sian grandan batalforton.

Post lerno de la artikolo *Servu al la Popolo*, iu batalanto de la Laosa Popola Liberiga Armeo parolis pri sia komprenaĵo: La spirito de Ĝang Side servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve estas lerninda por mi. Same kiel Ĝang Side, ankaŭ mi estis knabo el malriĉa familio. Mi ne povas forgesi, ke imperiistoj kaj la reakciuloj mortigis miajn gepatrojn kaj fraton, ke multaj mizeraj laboruloj de Laoso kaj de la tuta mondo ankoraŭ ne estas liberigitaj. Kaj li firme esprimis al siaj superuloj: "De nun, ordonu al mi ĉion, se tio nur estas servo al la popolo."

En ĝangalo en Norda Kalimantano, iu kadro de popolaj armitaj fortoj donis la unuan lecionon al rekrutoj. La enhavo de tiu leciono estis la brila verko de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. La nove venintaj junuloj lernis la instruon de Prezidanto Maŭ vorton post vorto: "Niaj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo." Ili esprimis, ke ili nepre ellernos Maŭzedongpenson kaj kreos novan situacion de la revolucio en Norda Kalimantano per sia sango kaj batalo.

KURAĜI BATALI KAJ MALTIMI SINOFERON

Dank' al senĉesa lernado kaj aplikado de Maŭzedongpenson, la batalantoj de popolaj armitaj fortoj tre kuraĝe batalas kontraŭ la reakciaj trupoj provizore superaj en kvanto kaj ekipo, kaj tute ne havas timon antaŭ la bajonetoj de malamikoj.

En iu batalo en Nan-provinco, Tajlando, juna batalanto de la popolaj armitaj fortoj estis sieĝita de malamikoj. En tiu kriza momento, tiu batalanto ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: "Tiu ĉi armeo posedas spiriton sentime marŝi antaŭen kaj ĝi nepre faligos ĉiujn malamikojn, sed neniam estos subigita de malamikoj. En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu sola homo, li batalos plu." Kaj tuj venis al li centobla kuraĝo. Li obstine batalis kontraŭ malamikoj, plene utiligante la terformon bone konatan por li. Vundinte kaj mortiginte dekelkajn malamikojn, li fine rompis la fortikan sieĝon. Post la batalo li diris: "La brila penso de Prezidanto Maŭ donis al mi grandan forton por venki la malfacilojn kaj malamikojn."

Iu gvidanto de la kamparanaj revoluciaj armitaj fortoj en Andhra, Hindio, gvidis taĉmenton da gerilanoj aktive batali en la kora regiono de la malamikoj per surprizatakoj. Iun nokton, kiam li translokiĝis kun sia taĉmento, aro da reakciaj armitaj policianoj ĉirkaŭis ilin. Kiam la malamikoj direktis siajn pafilojn kontraŭ li, li flegme riproĉis laŭte la reakcian polician oficiron kun plena fido al la venko de la revolucio: "Vi povas murdi nin, sed ne povas malhelpi la antaŭeniron de la revolucio. Neniu forto en la mondo povas subpremi la armitan revolucion de nia popolo. La sistemo de ekspluato kaj subpremo estas destinita al pereco!" Antaŭ sia heroa martiriĝo, li laŭte kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la hinda revolucio!" Tiuj krioj teruris la malamikojn. Tiuj krioj esprimis la revolucionan spiriton de la hinda popolo.



Batalantoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ.

MOBILIZI LA AMASOJN KAJ SINAPOGI SUR LA AMASOJ

Post lerno de la instruo de Prezidanto Maŭ “La plej riĉa fonto de povo por fari militon kuŝas en la popolamasoj”, revoluciuloj de la landoj en sudorienta Azio ekkonis el sia revolucia praktiko, ke oni povas renversi la reakcian regadon de imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj, nur se oni mobilizas la amasojn kaj sinapogas sur ili, por fari popolan militon.

Revolucia batalanta trupo el 12 personoj aktivanta en la areo de Pallia de Uttar Pradesh, Hindio, profundigis en la kamparon por fari propagandon al la amasoj, organizi kaj armi ilin. Ĝis la komenco de 1969, ĝi jam plivastigis la terenon, kie ĝi organizas revolucionan batalon, de 11 vilaĝoj ĝis 30 vilaĝoj, kaj ankaŭ la nombro de batalantoj grandigis. Ili diris kun profunda kompreno: “Kiam Maŭzedongpenso estas posedata de la popolamasoj, ĝi tuj fariĝas materia forto antaŭenpuŝanta la revolucion.”

La Tajlanda Popola Liberiga Armeo sendis multajn armitajn propagandajn taĉmentojn al foraj vilaĝoj por fari revolucionan propagandon. Kiam la vastaj kamparanaj amasoj komprenis la veron “**El la pafilo venas ŝtatpotenco**”, ili volonte sendis siajn karulojn en la Popolan Liberigan Armeon. Informiginte ke PLA estas armeo de la popolo kaj batalas por la mizeraj laboruloj, iu maljunulo kun aĝo de pli ol 60 jaroj loĝanta en vilaĝo en norda Tajlando iris kun sia filo por serĉi la liberigan armeon longe vojaĝante, por ke lia filo povu fariĝi batalanto sindediĉanta al la revolucio. Lia espero fine realiĝis. Kaj li estas tre ĝoja, kiam

li informiĝis poste ke lia filo estas tre brava en bataloj.

BATI LA MALAMIKON PER ELASTA KAJ FLEKSEBLA TAKTIKO

En siaj bataloj la popolaj revoluciaj armitaj fortoj de la landoj en sudorienta Azio serioze studas kaj aplikas la teorion de Prezidanto Maŭ pri la strategio kaj taktiko de popola milito.

La popolaj armitaj fortoj de okcidenta Kalimantano, Indonezio, diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili batas la malamikon per elastaj kaj flekseblaj strategio kaj taktiko. Foje ili donis senĉese pezajn batojn al la malamiko en monta regiono per la taktiko fari finton en oriento sed atakon en okcidento. Tiel ili plene lacigis kaj kaŭzis multajn vundojn kaj mortigojn al parto de Siliwangi-divizio, “atuta trupo” de la faŝisma militista kliko de Suharto. Post kvintaga kontinua batalado, la popolaj armitaj fortoj lerte evakuis sian pozicion.

Aplikante la strategion kaj taktikon de popola milito, la popola armeo kaj gerilanoj de Birmo ekstermas vivajn fortojn de la malamiko kaj donas pezajn batojn al la reakciaj trupoj kaj multfoje rompis la kontraŭrevoluciajn “sieĝekstermojn” de la malamiko. En la revoluciaj bazlokoj de Birmo cirkulas la jena kanto varme prikantanta Prezidanton Maŭ:

*La brilaj lumradioj de Maŭzedongpenso
Elmontras la direkton al la popolo.
Tenante en la kapo la Maŭzedongpenson,
Ekprenas la pafilon monda proletaro.
Sukcesas en atako, venkas en batalo,
Kaj brile disradias la Maŭzedongpenso.*

Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong (Volumoj 1-4)

En la unua volumo estas kolektitaj 17 verkoj de k-do Maŭ Zedong, skribitaj dum la periodoj de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) kaj la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927-1937). Ĝi estas eldonita en la lingvoj araba, birma, angla, franca, germana, hindia, indonezia, itala, japana, korea, persa, portugala, rusa, hispana, taja kaj vjetnama.

En la dua volumo estas kolektitaj 40 verkoj de k-do Maŭ Zedong, skribitaj dum la periodo de julio 1937, kiam eksplodis la Kontraŭ-japana Rezistmilito, ĝis majo 1941, kiam la dua kontraŭkomunisma fluso levita de Ĉiang Kajŝek estis repuŝita. Ĝi estas eldonita en la lingvoj araba, birma, angla, franca, germa-

na, indonezia, japana, korea, rusa, hispana, taja kaj vjetnama.

En la tria volumo estas kolektitaj 31 verkoj de k-do Maŭ Zedong, skribitaj dum la periodo de marto 1941 ĝis aŭgusto 1945, kiam estis atingita la fina venko de la Kontraŭ-japana Rezistmilito. Ĝi estas eldonita en la lingvoj birma, angla, franca, germana, indonezia, korea, japana, rusa, hispana, taja kaj vjetnama.

En la kvara volumo estas kolektitaj 70 verkoj de k-do Maŭ Zedong, skribitaj dum la periodo de la Tria Enlanda Revolucia Milito (de aŭgusto 1945 ĝis septembro 1949). Ĝi estas eldonita en la lingvoj birma, angla, franca, germana, indonezia, japana, korea, rusa, hispana, taja kaj vjetnama.

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj),
Pekino, Ĉinio

Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe Sekcio por Poŝta
Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399,
Pekino, Ĉinio

En la 1969-jara Aŭtuna Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

La 1969-jara Aŭtuna Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio okazis en Kanton. Tiu ĉi foiro kun tute nova fizionomio kaj tre abunda enhavo aperis antaŭ komercaj amikoj venintaj el diversaj anguloj de la mondo, transmaraj elmigrintaj ĉinoj kaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen, plene manifestis la brilajn atingojn de nia granda socialisma patrolando en la 20-jaraj socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, manifestis la grandajn venkojn de la tutlanda popolo, inspirata de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj direktata de la standardo de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, akiritajn en la nova alttajo de “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**”.

*Japanaj amikoj kaj laborantoj de la foiro
kune studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.*





Fremdlandaj amikoj rigardas gazetar-faksimilan maŝinon Dongfanghong-1, kiu estas projektita kaj fabrikita de niaj laboristoj, teknikistoj kaj revoluciaj kadroj.

En kunsido japanaj amikoj varme laŭdas la brilajn atingojn de la ĉina popolo sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ akiritajn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.





Kun granda intereso fremdlandaj gastoj rigardas la modelon de irigacia sistemo Kanalo Ruĝa Flago longa je 70 km. konstruita en Linhian-gubernio, Henan-provinco, ekspozitan en la agrikultura halo de la fiaro.



Dum vizito al Daĝaj-halo, tanzaniaj amikoj laŭdas la revolucion spiriton kaj heroan volon de daĝaj-anoj en penema luktado kaj sinapogo sur la propraj fortoj, alte tenante la grandan martelon uzitan de daĝaj-aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por dishaki rokojn.

La modelo de la Nankina Jangzi-pontego projektita kaj konstruita de nia lando mem estas ekspozata unuafoje en la fiaro. Ĝi allogas al si komercajn amikojn el diversaj kontinentoj, samlandanojn en Hongkong kaj Aŭmen kaj transmarajn elmigrintajn ĉinojn.



Fluga Disvolvigo de la Petrola

Industrio de Nia Lando

RAPIDE disvolviĝas la petrola industrio de nia lando. En ne tre longa periodo, ni jam fondis memstaran, kompletan kaj modernan petrolan industrion. Tio ĉi estas giganta sukceso de la ĉina popolo en firma efektivigo de la principo de Prezidanto Maŭ “**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**” en la socialisma konstruado.

En la pasinteco, plejparto de la petrolo bezonata de nia lando estis importita. En la jaro 1963, nia lando proklamis “fundamente sufiĉan memprovizon de petrolo” kaj de tiam la petrola produktado de nia lando disvolviĝas en pli granda rapideco. Nun jam tute sufiĉas la memprovizo de petrolaĵoj je kvanto, speco kaj kvalito bezonataj de nia lando en la nacia ekonomio, nacidefenda konstruado kaj disvolvo de scienco kaj tekniko.

Tre malforta estis la bazo, sur kiu disvolviĝis la petrola industrio de nia lando. Antaŭ la Liberiĝo, nia lando apenaŭ havis petrolan industrion. Dum 45 jaroj antaŭ la Liberiĝo, en tuta Ĉinio oni trovis nur 4 malgrandajn petrolkampojn kaj du malgrandajn gaskampojn, kies konservokvanto estis kompatinde malgranda. La totala longo de la boritaj putoj estis nur kelkdek mil metroj, kaj la totala produktokvanto de petrolo estis nur 2,950,000 tunoj. Tiam, por malhelpi la ĉinan popolon starigi ĝian propran petrolan industrion, imperiistoj de Usono kaj aliaj landoj fabrikis la t. n. teorion ke “Ĉinio malriĉas je petrolo”, kaj samtempe kun

tio per minacoj kaj logoj al la reakciaj regantoj de la malnova Ĉinio kaj per la trompaj artifikoj de la t. n. teknika “kunlaboro”, alsendo de specialistoj por “instruado” kaj provizado de ekipaĵoj, ili energie klopodis superregi niajn petrolejojn. Tiam fremdlanda petrolo monopoligis nian petrolan merkaton kaj eĉ asfalto por pavimi vojon estis importita.

Post la Liberiĝo, nia popolo fariĝis la mastro de nia lando, forpelis la agresajn fortojn de imperiismo kaj komencis la konstruadon de sia petrola industrio. La petrolaj laboristoj de nia lando liberigis sian penson, ĝisfunde rompis la fremdlandajn rutinojn, faris grandan kvanton da esplora laboro aplikante kompletan de novaj procedoj kaj metodoj de esploro kaj mezuro iom post iom kreitaj laŭ la konkretaj kondiĉoj de geologio, tekniko kaj ekonomio de nia lando, kaj trovis riĉajn fontojn de petrolo. Sur tiu bazo, novaj petrolkampoj konstruiĝis unu post alia. Precipe la ekspluato de Daking-a Petrolkampo en 1960 estis politika batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj moderna reviziismo.

Tiutempe, internacie imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj komplotis en koluzio kaj freneze oponis Ĉinion kun la intenco ĝin strangoli je petrolo; enlande, konforme al la bezonoj de imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj en opono kontraŭ Ĉinio la granda renegato Liu Ŝaŭki babilaĉis: “Ĉu estas ekonomie, ke ni tiom multe investas por



Vang Ginhi (meze), vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de Daking-a Petrolkampo serioze resumas sperton kune kun laboristoj.

mem ekspluati petrolon?” Li energie distrumpetis la filozofion de sklaveco antaŭ fremdlandanoj kaj rampismon kaj freneze oponis kontraŭ la granda principo de Prezidanto Maŭ **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”**. Sed la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Daking ripetade studis la “tri popularajn artikolojn” kaj la artikolojn *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiroj* de Prezidanto Maŭ, akiris el ili neelĉerpeblan forton kaj batalis pene sur la senlima sovaĝejo tage kaj nokte. Per siaj propraj fortoj de projekto, ekipo kaj tekniko, la laboristoj de Daking sukcesis determini la areon kaj konservokvanton de la petrolkampo en nur iom pli ol unu jaro, kaj sukcesis konstrui grandan petrolkampon unuaklasan en la mondo en mallonga tempo de nur tri jaroj, kaj tiamaniere frakasis la kriman intrigon de imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj kiuj intencis detruigi la socialisman konstruadon de nia lando, kaj ankaŭ donis pezan baton al la granda renegato Liu Ŝaŭki.

La konstruado de Daking-a Petrolkampo elhakis propran vojon por nia lando en multa, rapida, bona kaj ekonomia disvolvo de petrola industrio.

En la jaro 1964, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la alvokon **“Lernu de Daking en industrio”**. Firme respondante al ĝi, la laborista klaso de nia lando disvolvis movadon lerni de Daking. Ekzemple, la Petrolkampo de Jumen estas malnova petrolkampo, kies produktokvanto iom post iom malaltiĝis post longtempa ekspluatado.

En la pasinteco, plenmano da enpartiaj potencentantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj” dissemis pesimisman aserton, ke “la produktokvanto de Jumen-a Petrolkampo povas nur malpliĝi sed ne altiĝi; oni jam ne akiros multon de ĝi kaj faru nenion alian ol atendi ĝian likvidiĝon.” Sed laboristoj de Jumen-a Petrolkampo diris: “La ĉina revolucio bezonas petrolon, do ni nepre devigos la malnovan petrolkampon fari novan kontribuon!” En la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la gvido de la revolucia komitato, ili organizis “Laborgrupon por Ekspluati la Latentan Forton de la Petrolkampo” kun laboristoj kiel ĝia ĉefa parto partoprenitan de revoluciaj teknikaj laborantoj kaj revoluciaj kadroj, kaj tiu esploris kaj riparigis unu post alia la forlasitajn petrolajn putojn, kiuj jam ĉesis produkti, tiel ke el la lastaj denove elŝprucis nafto, redonante junecon al la malnova petrolkampo kaj ties produktokvanto stabile kreskis. En la tria sezono de 1969, la laboristoj jam plenumis antaŭdate la ĉefajn taskojn en produkto de nafto k. a. por tiu jaro.

La kelkaj tre malgrandaj petrolaj rafinejoj postlasitaj de la malnova Ĉinio estis tre postĝintaj en tekniko kaj ekipo, kaj ili povis produkti nur 12 ordinarajn petrolaĵojn en la komenca periodo post la fondiĝo de la popola respubliko. Samtempe kun la grandrapideca kaj altnivela konstruado de Daking-a Petrolkampo, la vastaj amasoj de petrolaj

laboristoj de nia lando disvolvis ankaŭ batalon por atingi la avangardan teknologion en petrolrafino de la mondo, kaj praktikis amasan teknikan renovigon. Ili disvolvis la revolucionan spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi paroli kaj kuraĝi agi, mem entreprenis eksperimentadon, projektis, kaj faris mezurajn aparatojn kaj aliajn ekipaĵojn, kaj post penado kaj luktado kontraŭ malfaciloj dum pli ol tri jaroj ili jam mastris la novajn teknikojn de petrolrafino, kiaj nova metodo de kataliza fendado, nova metodo de malfruiga koaksigo kaj novaj kataliziloj, konstruis nombron da modernaj petrolaj rafinejoj aplikantaj tiujn novajn teknikojn kaj faris teknologian reformon al la malnovaj petrolaj rafinejoj. Samtempe kun tio, konstruiĝis serio da fabrikoj povantaj produkti pogrande ekipaĵojn por petrolo industrio kaj ŝanĝis la postigintecon de nia lando antaŭ la Liberiĝo, ke ĉiuj ekipaĵoj por petrolo industrio estis importitaj.


En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de petrolaj laboristoj de nia lando batalas kun pli alta entuziasmo kaj disvolvis siajn senlimajn saĝon kaj kreivon. En la jaro 1966, la

ŝtalaj drilgrupoj 1202 kaj 1205 de Daking-a Petrolkampo sukcesis plenumi respektive putodriladon de cent mil metroj per relative malnovaj bormaŝinoj kaj superis la plej altan rekordon de 90,300 metroj de la usona imperiismo starigante la plej altan rekordon de putodrilado en la tuta mondo. La povo de naftekspluato kaj petrolrafino pliigita en la jaro 1966 estis pli granda ol tiu pliigita en la tuta periodo de la dua kvinjara plano. La efektivigitaj teknikaj renovigoj jam atingis la nombron de pli ol dudek mil. Dum la Granda Proletara Kultura Revolucio, la petrolo industrio de nia lando jam antaŭdate plenumis la taskon difinitan por la tria kvinjara plano.

Hodiaŭ, laŭ la granda principo de Prezidanto Maŭ **“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**, la petrolaj laboristoj de nia lando daŭre disvolvas kun arda entuziasmo la petrolan industrion de nia lando laŭ la vojo de sendependeco kaj memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj kaj klopodas por fari pli grandajn kontribuojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia patrolando.

Iu revolucia laborista gvidgrupo de Daking-a Petrolkampo studas konstruan projekton de olekampo.





Revoluciaj laboristoj de Daking-a Petrolkampo muntas novan akvoliveran ekipaĵon.

Atingoj de la Ŝpinteksa Industrio de Ĉinio

HIANGJANG

DIREKTATE de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj disvolvante la revolucion spiriton de sendependeco kaj memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj, nia vasta ŝpinteksistaro konstruis en modernan kaj prosperan ŝpinteksan industrion la duonkolonian agoniantan ŝpinteksan industrion de Ĉinio kies instalaĵoj preskaŭ ĉiuj estis importitaj kaj la krudaj materialoj plejparte ne povis esti provizitaj de ni mem. Sed nun, kotono, lano, silko, lino kaj aliaj krudaj materialoj bezonataj de nia ŝpinteksa

industrio delonge jam povas esti provizitaj de ni mem, kaj krome tre riĉaj estas iliaj fontoj, kiuj tute povas kontentigi la bezonojn por produkto de diversaj ŝpinaĵoj. La ŝpinteksaĵoj produktitaj de nia lando nun estas vendataj en pli ol 100 landoj kaj regionoj de la mondo.

La ŝpinteksa industrio estas unu el la plej aĝaj industrioj de nia lando. Antaŭ la Liberigo, sub la reakcia regado de imperiismo kaj Kuomintang la laborista klaso estis kruele subpremata



Vigleco kaj prospereco regas en la Tria Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko de Pekino.

kaj ekspluatata kaj ĝia produkto ne nur ne povis disvolviĝi, sed eĉ malpliigis tagon post tago. Tiam en la enlanda merkato svarmis ŝpinteksaĵoj de la imperiismaj landoj, tamen la vasta laboranta popolo sin vestis tre ĉifone. Post la Liberiĝo, la laborista klaso fariĝis gvida klaso de la ŝtato. Sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ ĝi kondukis la socialisman revolucion movadon, kiu akcelis la rapidan restariĝon kaj disvolviĝon de la produkto. Sed la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la ŝpinteksa branĉo furioze antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucion reviziisman linion, tutforte efektivigante “materian stimulon”, “profiton en komando” kaj “administradon de fabriko per specialistoj” kaj intencante konduki Ĉinion sur la kapitalisman vojon. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj revoluciaj laboristaro kaj kadraro sur la ŝpinteksa industria fronto faligis la plenmanon da pentorifuzantaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj akre kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, kaj multe altiĝis ilia konscio de klasbatalo kaj la batalo inter la du linioj. Firme plenumante la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**necesas forte teni la produktadon de ŝtofo**”, la laboristoj komandis kaj akcelis la produktadon per tenado de revolucio, tiel ke aperis prospera situacio de antaŭensalto sur la tutlanda ŝpinteksa industria fronto. La produktokvanto de kotonfadenoj dum la periodo de januaro ĝis aŭgusto de 1969 pliigis je 34.5% kompare kun tiu de la sama periodo de

1965 antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio; grandmezure kreskis ankaŭ la produkto de diversaj aliaj ŝpinteksaĵoj.

Dum plena utiligo de la antaŭaj ŝpinteksaĵoj bazoj kaj disvolvo de ilia latentaj produktokapablo, ni ankaŭ kondukis laŭplane grandskalan fundamentan konstruadon, nove konstruis kaj grandigis milojn da ŝpinteksaĵoj fabrikoj de koton, lano, lino kaj silko, pres-tinkturaĵoj fabrikoj, trikaĵfabrikoj kaj aliaj. La produkta povo por teksaĵoj kotonaj, lanaj, silkaj kaj aliaj havis grandan kreskon kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. En la malnova Ĉinio tute ne troviĝis ĥemifibra industrio. Post la Liberiĝo ni starigis nombron da modernaj viskoz-fibraĵoj kaj sintez-fibraĵoj fabrikoj surbaze de nenio. Nun, en ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj jam estas konstruitaj modernaj ŝpinteksaĵoj entreprenoj kiuj havas malsamajn skalojn kaj diversajn karakterizaĵojn.

Plejparto de tiuj novaj ŝpinteksaĵoj fabrikoj estas aranĝita en internaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando, kie riĉas koton, lano, lino, kokonoj kaj aliaj krudaj materialoj por teksado. Antaŭ la Liberiĝo preskaŭ neniu moderna ŝpinteksaĵoj entreprenoj troviĝis en iuj el niaj urboj, kaj nun ili jam fariĝis bazoj kun diversaj modernaj ŝpinteksaĵoj entreprenoj sufiĉe grandskalaj.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**necesas pli multe starigi mez- kaj malgrand-tipajn entreprenojn**”, ni komencis meti pli da atento sur starigon de mez- kaj malgrand-tipaj entreprenoj en la

Ŝpinteksa industrio de nia lando post la jaro 1957. Tio utilis al la mobilizo de ĉiuj pozitivaj faktoroj por rapidigi la disvolviĝon de la ŝpinteksa industrio. Samtempe ni ankaŭ konstruis laŭplane ŝpinteksajn kaj pres-tinkturajn fabrikojn, lanajn kaj silkajn fabrikojn kun naciecaj karakterizaĵoj en la regionoj kie amase loĝas diversaj nacimalplimulto. Nun, de la piedo de Tianŝan-montaro ĝis la bordoj de Lhasa-rivero, de la stepo de Interna Mongolio ĝis la Junnan-Gujŝou-a Altebenejo, ĉie konstruiĝis diversaj modernaj ŝpinteksaj fabrikoj unuj post aliaj. En la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono troviĝis neniu spindelo antaŭ la Liberiĝo, sed nun ni jam finkonstruis tie kvar ŝpinteksajn entreprenojn, unu kombinumon de ŝpinteksado kaj pres-tinkturado, tri lanŝpinejojn, unu kombinumon por malvolvado de kokonoj kaj silkteksado kaj ankaŭ trikajfabrikojn. La disvolviĝo de la ŝpinteksa industrio en tiuj regionoj grandigis la vicaron de la laborista klaso, prosperigis la ekonomion kaj plifortigis la revolucion unuiĝon de la diversaj nacioj de nia patrolando.

La ŝpinteksa maŝinkonstrua industrio estas la materia kaj teknika bazo de la tuta ŝpinteksa industrio. En la pasintaj dudek jaroj, la ŝpinteks-

maŝina industrio de nia lando trapasis jenan vojon de disvolviĝo: elkresko el nenio, iom-post-ioma grandiĝo, kaj multiĝo de la specoj de produktaĵoj. Nun la diversaj ŝpinaj kaj teksaj instalaĵoj faritaj de nia lando ne nur povas plene kontentigi la bezonojn de altrapideca disvolviĝo de la ŝpinteksa industrio en nia lando, sed ankaŭ helpis iujn landojn en Azio, Afriko kaj la orienta Eŭropo starigi dekojn da modernaj ŝpinteksaj entreprenoj. Tio estas granda venko de la orientilo de Prezidanto Maŭ "sinapogo sur propraj fortoj".

Antaŭ la Liberiĝo, troviĝis en nia lando nur kelkaj malbone ekipitaj fabrikoj kun postĝinta tekniko por farado de ŝpinaj kaj teksaj maŝinpartoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la vastaj amasoj de laboristoj por konstruo de ŝpinaj kaj teksaj maŝinoj firme iris la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj faris ĉion per siaj propraj fortoj, energie disvolvante amasan movadon. Ili organizis la riparejojn de ŝpinaj kaj teksaj maŝinoj kaj faris al ili laŭplane pligrandigon kaj reformon laŭ iliaj karakteroj en tekniko, efektivigis produktadon de difinitaj objektoj kaj produkton por kompletigi maŝinojn dank' al organizado de la ŝtato. Nur post 2-3-jara penado jam solviĝis la problemo de



La granda riĉrikolto de kotonon en la sudo kaj nordo de nia lando certigis la plenan liveron de kruda materialo al la ŝpinteksa industrio. Jen la komunumanoj de Ĉengkiaŭ - komunumo de Hinje-gubernio de Henan-provinco rikoltas kotonon.

fabrikado de kompletaj ekipaĵoj per propraj fortoj nesolvita de la malnova Ĉinio dum pli ol duona jarcento.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“rompi superstiĉon kaj liberigi penson”** kaj disvolvante la revolucion spiriton kuraĝi pensi, kuraĝi agi kaj kuraĝi revolucii, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj energie kondukis teknikan revolucion, kio radikale ŝanĝis la fizionomion de la ŝpinteksa maŝinkonstrua industrio. Peza fizika laboro estas anstataŭigita de mekanika manipulado; malnovtipaj kadukaj ilmaŝinoj estis anstataŭigitaj per altefikaj precizaj ilmaŝinoj.

Sub la kuna klopodado de fabrikoj de ŝpinaj kaj teksaj maŝinoj, ŝpinejoj kaj sciencaj unuoj, la ŝpinaj kaj teksaj instalaĵoj produktitaj de nia lando senĉese pliboniĝis kaj en kvalito kaj en kapableco. Multaj el tiuj instalaĵoj jam atingis kaj superis la progresintan nivelon de la mondo. Ekzemple, la altprodukta kombomaŝino uzata en produktado en la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝuste estis rezulto de la atingoj akiritaj de la teksistoj de la tuta lando en la teknika renovigo. Ĝi adoptis novtipajn kombajn maŝinpartojn taŭgajn al altrapideco, novan metodon de sensemigo, aŭtomatan kontrolilon kaj polvosuĉan instalaĵon. Ĝia pohora produktokvanto superis 25 kilogramojn.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la ŝpinteksaj laboristoj de Ŝanhajo kaj aliaj regionoj serioze studis la instruon de Prezidanto Maŭ **“Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj”**, kaj plej energie kondukis amasan movadon de renovigo kaj kreado. Ili diris: **“Ni devas disvolvi kaj superi kion la fremdaj landoj havas. Ni kreos kion la fremdaj landoj ankoraŭ ne havas.”** Subtenante unu alian en laborado ili organizis grupojn kun partopreno de laboristoj, teknikistoj kaj revoluciaj kadroj. Ili persistis ĉe scienca eksperimentado en la monto-translokiga spirito de la Malsaĝa Avo kaj sukcesis krei nombron da ŝpinaj kaj teksaj ekipaĵoj kiuj atingis aŭ superis la progresintan nivelon de la mondo. Ni prenu la maŝinon por fajnfadenoj kiel ekzemplon. Kiam la maŝino adoptis altrapidajn spindelojn, la pohora produktokvanto de mil spindeloj por mezdikaj fadenoj altiĝis je 25%.

Nun la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio sur la ŝpinteksa industria fronto, kun triumfa emocio kaj viglanimo, batalas por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn, sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj forta kuraĝigo de la spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio.

En la arda socialisma revolucia konkurso la revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja 17-a Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko decidis batalakiri ankoraŭ pli grandajn venkojn en la revolucio kaj produkto.



Impetas la Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun

LA Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun estis konstruita en 1953. En la komenco de ĝia konstruado, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ manskribis al ĝi dek unu ore brilantajn ideografiajn signifantajn “**Por Memorigo pri la Bazigo de la Unua Aŭtofabriko**”, kiuj profunde gravuriĝis en la koro de aŭtokonstruaj laboristoj, starigis solidan fundamenton kaj malfermis venkan naviglinion por la flugrapida disvolviĝo de la aŭta industrio de nia lando.

Dum la lastaj dek kelkaj jaroj, sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la “Konstitucio de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio” persone difinita de Prezidanto Maŭ kaj plene disvolvante siajn saĝon kaj talenton, la aŭtokonstruaj laboristoj de nia lando frakasis per revolucia sentima spirito la fremdlandajn rutinajn regulojn, kiuj katenis la disvolviĝon de la produktiveco, tiel ke la aŭtoprodukto grandskale kreskis. La produkta nivelo permesita de la origina projekto estas multe superita, kaj novaj specoj de produktoj aperas senĉese. Antaŭe ĝi povis produkti nur unusolan specon de kamiono “Liberiĝo”, sed nun ĝi produktas ankaŭ altklasajn aŭtomobilojn “Ruĝa Flago” en pluraj tipoj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĝi sukcesis fabriki aŭtomobilon “Ruĝa Flago” kun hidraŭlika rapidecvariigilo kaj tri vicoj da sidiloj movataj per elektro. De sia naskiĝo la altklasaj aŭtomobiloj “Ruĝa Flago” ricevis varman laŭdon de niaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen kaj fremdlandaj amikoj, post ekspozado en pollanda, franca kaj japana foiroj kaj la foiro de eksportaj varoj de Ĉinio en Kantono.

Por ke la kamiono “Liberiĝo” povu esti konforma al la malsamaj geografiaj kaj klimataj kondiĉoj de diversaj regionoj en nia lando, aŭtokonstruaj laboristoj kaj revoluciaj teknikaj laborantoj faris longan vojaĝon veturigante memfabrikatajn aŭtojn kaj faris eksperimentojn en kaprica vetero kaj en abrupta ŝanĝiĝado de temperaturo. Ili veturis tra la Norda Stepo de la Nordoriento, Junnan-Gujĝoŭ-a Altebenejo, sudorientaj apudmaraj regionoj kaj la senlima Gobi-dezerto de nia lando. Post tiuj eksperimentoj ili faris plibonigojn en la kvalitoj de la aŭto kaj en teknologio, tiel ke ĝia propra pezo estas reduktita kaj ĝia portkapablo pliigita, ĝiaj normoj de rapideco, benzin-konsumo kaj aliaj superis tiujn en la origina projekto, kaj ĝiaj eksteraj kaj internaj kvalitoj altiĝis.

En la pasinteco, 80 procentoj de ŝtalaj materialoj uzataj en nia aŭto-produkto estis importitaj. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**”, la revoluciaj aŭtokonstruaj laboristoj kaj metalurgiaj laboristoj decidis mem produkti ŝtalajn materialojn bezonatajn en aŭtoproduktado. Post ripetada eksperimento ili akumulis pli ol 76,000 sciencajn konstantaĵojn kaj fine sukcesis produkti novajn specojn de ŝtalo necesajn por nia aŭtoprodukto. La aŭtoj fabrikataj el niaj memproduktitaj ŝtalaj materialoj manifestis siajn bonajn kvalitojn post veturado de 100,000 km.

“Ni ne devas iri la malnovan vojdon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj. Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn teknikojn, por konstrui nian landon en modernan so-

cialisman potencaj landoj en ne tro longa historia periodo." Kvazaŭ lumturo, la granda instruo de Prezidanto Maŭ direktis la aŭtokonstruajn laboristojn energie disvolvi amasajn teknikajn revoluciojn kaj renovigojn por fari novajn kontribuojn en la sendependa kaj memstara disvolvo de aŭto-industrio en nia lando.

En la komenca periodo de la konstruado de la Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun ĝiaj ekipaĵoj plejparte estis importitaj. Tiuj ekipaĵoj ĉiuj estas de la niveloj de tridekaj aŭ kvardekaj jaroj kaj tute ne povas respondi al la postuloj de la nuna aŭto-fabrikado de nia lando. La senegoismaj kaj maltimaj aŭtokonstruaj laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso, kuraĝe kondukis revolucion super tiuj ekipaĵoj. En la jaro 1958 de la granda antaŭensalto, ili faris multajn gravajn reformojn al la fremdlandaj ekipaĵoj. En 1964, sub la kuraĝigo de la alvoko de Prezidanto Maŭ "**Lernu de Daking en industrio**", la aŭtokonstruaj laboristoj efektivigis pli ol 1,800 teknikajn renovigojn kaj plifortigis pli ol 380 malfortajn ĉenerojn en la produktado. En 1965 la revoluciaj laboristoj de la tuta fabriko sin organizis en centojn da sturmaj taĉmentoj por konkeri ŝlosilajn malfacilojn en la produkto kaj plie efektivigis pli ol 3,000 teknikajn renovigojn, el kiuj multaj atingis progresintajn nivelojn.

En la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la revolucion standardon de amasa kritiko, la vasta aŭtokonstrua laboristaro

forte kritikis reakciajn absurdaĵojn de Liu Ŝaŭki kiaj "administrado de fabriko per specialistoj", "rampismo" kaj "sklaveco antaŭ fremdlandanoj", disvolvis la revolucion spiriton kuraĝe pensi kaj kuraĝe agi, konstruis kaj renovigis multajn altefikajn mekanikojn kaj centojn da aŭtomataj produktaj ĉenoj, tiel ke aperis nova antaŭensalto en la produktiveco.

La kompleto de ekipaĵoj de la gasgeneratora stacio de tiu fabriko estis importita en la pasinteco, kaj kun ĝi ankaŭ fremdlanda regularo. Laŭ la regularo, la ekipaĵoj ekfunkciigitaj devas esti daŭre funkciigitaj laŭ normala skalo, tute egale, ĉu oni bezonas tiom da gaso aŭ ne, ĉar, alie, ili eksplodos. Tiamaniere, kiam la fabriko ne bezonis aŭ bezonis nur malmultan gason, la superflua gaso devis esti forbruligita senutile. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la aŭtokonstruaj laboristoj faris revolucion super tiuj fremdlandaj ekipaĵoj. Kun sentima revolucia spirito kaj rigora scienca sinteno, ili renovigis neraciajn partojn de la ekipaĵoj kaj starigis kompletan de sciencaj novaj reguloj laŭ la leĝoj de la funkciado de miloj da specoj de ekipaĵoj. Post la reformo, la gasgeneratora stacio produktas gason en kvanto konforma al la bezono de la produkto, kaj tiel ĝi ĉiumonate ŝparas pli ol 500 tunojn da bonkvalita karbo kaj 80,000 kilovathorojn da elektro.

En la lastaj pli ol dek jaroj, okazis al la Unua Aŭtofabriko tre profundaj ŝanĝiĝoj en ĉiuj flankoj.

Modelon de iu teknika renovigo studas teknika renoviga sturma taĉmento de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa forto kaj kun partopreno de teknikistoj kaj revoluciaj kadroj.



Sed, la plej okulfrapa estas la ŝanĝiĝo de la spirita fizionomio de la aŭtokonstruaj laboristoj.

La veterana laboristo de la branĉa fabriko por forĝado Vang Hongjuan vivis nehoman vivon en la malnova socio, ne havante sufiĉajn manĝon kaj vestaĵon kaj suferante insulton kaj vipadon, de post kiam li fariĝis lernoservisto en fabriko de kapitalistoj. Estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu savis lin el la abismo de mizero kaj ebligis al li vivi kiel mastro de la lando. En la lastaj pli ol dek jaroj, li ne forgesis la amaron de sia klaso kaj firme tenis en la memoro la suferitan mizeron plenan de sango kaj larmoj. Li senlime amas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, diligente studas kaj aplikas vive Maŭzedongpenson kaj firme sekvas plenkore Prezidanton Maŭ en la revolucio. Lia produkta grupo ĉiujare laŭplane plenumis siajn produktajn taskojn. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, kune kun la revoluciaj laboristoj en la fabriko, li kondukis malfacilan batalon kontraŭ la granda perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la fabriko kaj gajnis la naskiĝon de la ruĝa potenco. De post la Naŭa Kongreso de la Partio, li serioze studis la dokumentojn de la kongreso kaj pliapaŝe plifortigis sian konscion pri daŭra revolucio. Per praktikaj agoj li firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **“akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”**. Kiam li trovis ke iu maŝino en la laborejo ne povas kontentigi la bezonon de la disvolviĝo de produkto, li do interkonsiliĝis kun siaj kamaradoj kaj kune reformis tiun maŝinon, tiel ke ties produkta povo altiĝis trioble. Poste, Vang Hongjuan efektivigis 13 aliajn teknikajn renovigojn kune kun siaj kamaradoj. Antaŭ nelonge, li kaj aro da eminentaj aŭtokonstruaj laboristoj glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, pli ol 100 eminentaj aŭtokonstruaj laboristoj estis elektitaj en revoluciajn komitatojn de triflanka kombiniĝo de la ĝenerala fabriko kaj branĉaj fabrikoj. Iliaj oficoj ŝanĝiĝis, sed ilia naturo de laborista klaso ne ŝanĝiĝis. Ili konservas intiman ligiĝon kun la amasoj kaj aktive partoprenas fizikan laboron. La membro de la revolucia komitato de la ĝenerala fabriko kaj laborista reprezentanto Baŭ Dianjuan, post sia elektiĝo en la revolucion komitaton de triflanka kombiniĝo, ankoraŭ persistas en fizika laboro en la branĉa fabriko por forĝado, kie la laboro estas plej peniga. En fizika laboro li ĉiam faras la pezajn kaj malpurajn laborojn. Foje, la fornomo de la dek-tuna elektra forno subite



Li Fu (la unua de maldekstre), ĉefkomitatano de la revolucia komitato de la branĉa fabriko por forĝado aŭskultas opinion de laboristoj dum sia partopreno en fizika laboro.

disfalas, la alta varmo de ĝia interno malpermesis alproksimiĝon de homoj. Baŭ Dianjuan tuj gvidis la laboristojn redukti la varmon per altprema malvarma vento kaj poste li batalis senĉese 6 horojn en la forno kun ankoraŭ tre alta varmo. Tiel la forno estis finfine riparita kaj la produktado garantiita. La laboristoj diris: “Fariĝinte kadro, maljuna Baŭ ne havas la manieron de estro, li estas vere bona reprezentanto de ni laboristoj.”

Nun, la revoluciaj laboristoj de la Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun vive studas kaj vive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ pli fervore. Ĉiuj konkuras por fariĝi avangardoj en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto kaj produktas pli multajn kaj pli bonajn aŭtojn por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando.



NASKIĜIS TUTE AŬTOMATA EKIPAĴO POR LONGDISTANCA TELEFONADO

La unua kompleto de tute aŭtomata ekipaĵo por longdistanca telefonado projektita kaj fabrikita de nia lando mem estas sukcese instalita en la Pekina Administrejo por Longdistanca Telekomuniko. Prova uzado de tiu instalaĵo en telefonado inter Pekino kaj Tiangin montris, ke en interurba telefonado ĝi same bone funkcias kiel aparato en enurba telefonado.

En la pasinteco, por fari longdistancon telefonadon, unue oni devis fari registron ĉe loka telefonejo, por ke tiu ĉi kontaktu kun la dezirata telefonejo. Poste deĵoranto de la alflanka telefonejo devas starigi kontakton kun la vokata persono, kaj antaŭ ol la telefonado povis komenciĝi, la vokinto devis ankoraŭ esti kontaktita. Dum la telefonado, la deĵoranto devis registri la tempon uzitan kaj poste oni devis ankaŭ kalkuli ĝian koston.

Dank' al la nova aŭtomata ekipaĵo por longdistanca telefonado, oni povas rekte kontakti kun dezirata telefonnumero en alia urbo per ordinara telefona aparato laŭ difinita numero. Dum la telefonado, la aparato povas aŭtomate registri la daton kaj la tempon uzitan kaj precize elkalkuli la pagendan sumon laŭ tarifo konforma al la distanco. La naskiĝo de tiu oportuna instalaĵo pretigis bonan kondiĉon por aŭtomatigi longdistancon telefonadon en nia tuta lando.

MEMMOVIĜANTA KOMBALNO POR RIKOLTO DE GRENOJ

Antaŭ nelonge, la unua memmoviĝanta kombalno por rikolto de grenoj de nia lando estis sukcese fabrikita post provado de la Kajfeng-a Maŝinfabrika de Henan. Tiu ĉi kombalno kun fabrika marko "Ruĝa Flago" atingis la avangardan nivelon kaj estas projektita kaj farita tute de nia lando mem.

Longa provado sur kampoj montris, ke la maŝino estas facile funkciigebla kaj direktebla kaj bone laboras. Ĝi estas uzebila kaj en grandaj kaj en malgrandaj kampoj. En kazo de

rikolto de tritiko kun produktokvanto de 200 kilogramoj po muo, ĝi povas fari falĉadon, degrajnigon, selektadon kaj pajlokolektadon por ĉ. dudek hektaroj en ĉiu tago. Post iometa alĝustigo kaj ŝanĝo, ĝi povas esti uzata por rikolti sojon, milion, pizon, kolzon ktp. Ĝi povas labori en kampoj, kie kuŝiĝis plantaĵoj, multas herbaĉoj kaj sintrovas reto de irigaciaj fosaĵoj. Ĝi laboras duoble tiom efike kiom trenata kombalno kaj ĝia perdo-procento de greno estas duone malpli alta.

Tiu ĉi memmoviĝanta kombalno por rikolto de grenoj "Ruĝa Flago" estas projektita kaj fabrikita post kvin-monata penado de la projekta grupo de "triflanka kombiniĝo", organizita de la revolucia komitato de la Kajfeng-a Maŝinfabrika, post esplorado kaj enketado en agrokulturaj bazaj unuoj kaj amasa diskutado pri la projekto en la fabrika.

ŜARĜA KAJ MALŜARĜA MAŜINO POR KARBOPECEGOJ

La revoluciaj laboristoj de la Administracio de Kinhuangdaŭ-haveno de nia lando lastatempe sukcese fabrikis post provado la unuan kompletan de ŝarĝa kaj malŝarĝa maŝino por karbopecegoj.

De multaj jaroj, la enŝipigo de karbopecegoj ĉe Kinhuangdaŭ-haveno estis farita per homfortoj kun malalta laborefiko kaj granda laborintenseco. Dank' al la uzado de la nomita maŝino, nun oni povas pleniĝi 10000-tonelan ŝipon per karbopecegoj en 5-6 horoj kun laborefiko pli ol dekoble pli alta ol tiu de homfortoj.

Tiu maŝino estas projektita kaj konstruita de niaj revoluciaj laboristoj mem sub la gvido de Maŭzedongpenso. Dum projektado de la fosaĵo por la maŝino, la laboristoj kaj teknikistoj partoprenantaj tiun laboron faris plurflojan observadon kaj konstatis, ke la leviĝo kaj malleviĝo de la subtera akvo de la bordo multe diferencas de tiuj de la marakvo, decideme neigis la "teorion" de la burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj", ke oni nepre devas fari fosaĵon ĉe haveno same kiel subakvan konstruaĵon kaj havigi al si ekipaĵojn kaj teknikon necesajn por subakva konstruado. Ili ellaboris simplan, facile plenumeblan projekton de konstruado, ŝparis grandan sumon da mono por la ŝtato kaj multe rapidigis la laboron.


Tiu ŝarĝa kaj malŝarĝa maŝino jam estas fininstalita kaj komencis funkcii ĉe Kinhuangdaŭ-haveno.



Socialisma Revolucia Konkurso en la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio

Sub la kuraĝigo de la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandan venkon**”, disvolviĝas en la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio socialisma revolucia konkurso “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**”. La vastaj amasoj de kadroj kaj laboristoj diris brave: “Glorigu la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la grandan socialisman patrolandon, jen estas nia decido kaj ĵuro.” De la ĝenerala oficejo ĝis diversaj fabrikoj, laborejoj kaj laborgrupoj, ĉie bolas fervoro por kompari sin kun la progresintaj, lerni de la progresintaj kaj klopodi esti progresintaj. Ili energie tenas la revolucion, forte stimulas la produkton, klopodas produkti pli da ŝtalo kaj pli bonan ŝtalon kaj akiris elstarajn atingojn unu post alia por subteni la nacian defendon kaj defendi la patrolandon. En tio estas plene manifestata la vigla, solidara kaj batala spirito de la laboristoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio armitaj per Maŭzedongpenso.



Nokto de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio





(Supre maldekstre) La laboristoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio serioze plenumas la taskojn de batalo, kritiko kaj reformo. La bildo montras, ke membroj de la reordiga kaj reforma grupo de la maŝinkonstrua fabriko konsultas veteranajn laboristojn por reformi neraciajn regulojn kaj sistemojn.


(Supre meze) Laboristoj de la laborejo por lignaj modeloj de la maŝinkonstrua fabriko mem projektis kaj konstruis universalan frezmaŝinon uzatan en fabriko de lignaj modeloj.

(Supre dekstre) La gvidaj kadroj de diversaj niveloj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio elstarigas la politikon de la proletaro kaj persiste partoprenas produktajn laborojn.

(Sube maldekstre) Produkto de ŝtalaj ingotoj

(Sube dekstre) Produkto de koakso





Ŝtalaj tuboj estas transportataj aliloken.



La grupoj de teknika renovigo de triflanka kombiniĝo de laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikistoj de diversaj fabrikoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio aktive disvolvas aktivadon por solvi ŝlosilajn problemojn en produktado.

Lando de Fiŝoj kaj Rizo —

Lando de Revolucio

—Vizito al Longkiaŭ-brigado de
Ĉangkiaŭ-komunumo, Vuhian-
gubernio, Giangsu-provinco

ESTAS la komenca aŭtuno. Ĉe la bordo de la lago Tajhu, la senlima rizkamparo aspektas kiel bela brokato kaj elspiras aromon de rizo. Ĉie prezentiĝas sceno de riĉa rikolto.

La baseno de Tajhu en Giangsu en nia lando estas fama kiel “lando de fiŝoj kaj rizo”. Tien mi iris viziti Longkiaŭ-brigadon. La historio de “lando de fiŝoj kaj rizo” fakte estas ne tre longa. Prenu Longkiaŭ-brigadon kiel ekzemplon, antaŭ pli ol 10 jaroj ĝi ankoraŭ estis malriĉa loko, ne povanta mem provizi sian bezonatan grenon. Ĝis la antaŭvespero de la granda antaŭensalto en 1958, la brigado ĉiujare konsumis sufiĉe grandan kvanton de greno liverata de la ŝtato. Kaj estas ankoraŭ tre freŝaj por la komunumanoj la memoroj pri la mizeraj tempoj antaŭ la Liberiĝo, dum kiuj la loĝantoj estis turmentataj de naturaj katastrofoj de sekeco kaj pluvinuado kaj ne havis sufiĉajn nutraĵojn kaj vestaĵojn, tiel ke multaj familianoj ofte disiĝis pro malriĉeco. Post la fonda de la popola komunumo, responde al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**Ierni de Daĝaj en agrikulturo**” kaj sub la puŝego de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la Longkiaŭanoj

prenis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn de Daĝaj kiel modelon, disvolvis la revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj faris pluan paŝon antaŭen de la jam atingita pozicio.

En la jaro 1968, tiu brigado trafis malofte renkontitan katastrofegon de malutilaj insektoj, tamen ĝi ankoraŭ akiris riĉrikolton de greno. La pomua meza produktokvanto de la kampoj kun tri rikoltoj de rizo kaj tritiko estis 909 kilogramoj. Tiu de la produkta grupo, kies rikolto estis plej alta, eĉ superis 1,000 kilogramojn. La tuta brigado superplenumis la taskon de vendo de greno al la ŝtato je 74%. En 1969, Longkiaŭ-brigado refoje akiris riĉan rikolton de frua rizo sur vasta surfaco, tiel ke el la du rikoltoj de tritiko kaj frua rizo la brigado jam superplenumis la ŝtate fiksitajn taskojn de vendo de greno al la ŝtato. Tio estas rezulto de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso fare de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, revoluciaj kadroj kaj vastaj amasoj de Longkiaŭ-brigado, kaj giganta frukto de la Granda Proletara Kultura Revolucio!



Komunumanoj de la Longkiaŭ-brigado faras zorgeman mastrumadon sur la kampoj por akiri ankoraŭ pli grandan riĉrikolton.

ĈU LA PLIPRODUKTO ATINGIS SIAN KULMINON?

Longkiaŭ-brigado troviĝas en la loko plej dense loĝata en Giangsu. Tie la terspaco estas malgranda, sed la loĝantoj multaj, kaj plie la densaj riverretoj kaj multaj lagoj grandaj kaj malgrandaj okupas multan spacon, tiel ke la agroj estas malmultaj. Post la Liberiĝo, sub la influo de la kontraŭrevoluca reviziisma linio de la granda renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, iuj personoj, kiuj havas seriozan spontanegan kapitalisman penson, zorgas monan enspezon kaj neglektas grenan produkton. Ili pledis por okupiĝi ĉefe pri flankaj produktaĵoj kaj kulturi pli da ekonomiaj plantoj kaj malpli da grenaj kaj, cetere, disvastigis la eraran aserton, kia "la pliprodukto jam atingis sian kulminon". Ili opiniis: "La produktokvanto de Longkiaŭ-brigado estas ne malalta, ĝia atingo

tre granda, kaj ĝia kontribuo ne malgranda", unuvorte, "la pliprodukto jam atingis sian kulminon".

La heroaj agadoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj-brigado, kiuj venkis la malfavorajn naturajn kondiĉojn, sinapogante sur propraj fortoj kaj strebante plenergie al prospereco, diskonatiĝis tra la tuta lando kaj ankaŭ al Longkiaŭ-brigado. Precipe la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "**Ierni de Daĝaj en agrikulturo**" kuraĝigis la vastajn amasojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longkiaŭ. Ili diris brave: "Revolucio necesas por la lokoj kun malfavoraj naturaj kondiĉoj kaj ankaŭ por lando de fiŝoj kaj rizo." Sed la agentoj de la granda renegato Liu Ŝaŭki en la brigado diris absurde: "La sperto de Daĝaj, kie la naturaj kondiĉoj estas malfavoregaj, ne estas aplikebla por ni ĉi tie, kie estas lando de fiŝoj kaj rizo, eĉ se ni ĝin ellernus." Per tio ili intencis kontraŭstari la batalan alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj malhelpi la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn daŭre revolucii kaj plue pliiĝi la produktkvanton.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la gvido de la revolucia komitato, la vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longkiaŭ-brigado forte kritikis la serion da reakciaj absurdaĵoj de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Por pli vastigi la kulturatan spacon kaj akiri altan kaj stabilan produkton kaj ekvilibri produktadon, ili plene komplekse ebenigis kaj ordigis la agrojn kiel Daĝaj-brigado. Post malfacila luktado, ili transformis la malebenajn kaj malgrandajn kampojn, kiuj okupis 80% de la tuta kulturata spaco de la brigado, en kampojn kun granda surfaco kaj per tio plivastigis la kulturatan spacon. Krom tio, ili transformis kampojn kun amplekso de pli ol 300 muoj, kiuj estis konkavaj kaj donis nur unu rikolton en jaro, en fekundajn kampojn kun tri rikoltoj de rizo kaj tritiko kaj tiel plivastigis spacon de kampoj plurrikoltaj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longkiaŭ-brigado elmetis la sloganon de agado "Rompu la rutinon de du rikoltoj de tritiko kaj rizo en sudo de Jangzi-rivero, disvastigu kulturatan spacon de durikolta rizo kaj efektivigu la sistemon de tri rikoltoj de rizo kaj tritiko en unu jaro".

En 1963, tiu brigado kulturis nur du muojn da rizplantoj kun du rikoltoj en jaro. En 1968 ĝi jam plivastigis la kulturspacon de rizo kun du

MALFACILOJ NE POVAS TIMIGI LA LONGKIAŬ-ANOJN

rikoltoj ĝis 63% de la tuta kulturspaco de rizplantoj. En tiu jaro kvankam oni trafis aparte grandan atakon de malutilaj insektoj, tamen la pomua meznombra produktokvanto de rizo ankoraŭ atingis 584 kilogramojn kaj tiu de la kampoj por tri rikoltoj atingis 909 kilogramojn superante la historian rekordon.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo”**. Laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longkiaŭ-brigado plivastigis en 1969 la kulturspacon de rizplantoj de du rikoltoj de 63% de la tuta spaco de rizkampoj ĝis 100%. Ili apogis sin sur propraj fortoj, luktis peneme, venkis multajn malfacilojn, kaj pliigis la pomuan meznombrian produktokvanton de frua rizo de la jaro 1969 je ĉirkaŭ 20% kompare kun tiu de la jaro 1968, kiu tenis la historian rekordon.

Kiam Longkiaŭ-brigado komencis kulturri-plantadojn por du rikoltoj, iuj opiniis ke por tio necesas duoblaj laborfortoj kaj sterko kio povos kaŭzi prokraston de la kulturaj sezonoj kaj malcertecon de produkta kvanto. Profitante la okazon plenmano da klasaj malamikoj disvastigis klaĉojn, kia: “ŝajne, planti rizon por du rikoltoj povos pliigi produkton, sed fakte rezultigos malpliigon; la gajno ne kovros la perdon.” Alfronate al la provoko de la malamikoj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj disvolvis fortan revolucion amasan kritikon kontraŭ la malamikoj, profunde malkovrante la krimojn de la bienula klaso. Antaŭ la Liberiĝo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sate suferis la ekspluaton kaj subpremon de la bienuloj kaj kulakoj, kaj multaj el ili ne povis preni edzinon pro malriĉeco. La tuta vilaĝo tiam estis nomata kiel “vilaĝo de bonzoj”, kaj cirkulis popolkanto

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj agrikulturaj teknikistoj de la brigado selektas bonajn speciojn de rizo.





La komunumanoj de la brigado kunvenas por celebri la riĉrikolton.

en la ĉirkaŭaĵo “oni ne edzinigas filinon al la vilaĝo de bonzoj, same kiel fenikso ne haltas sur sterila kampo”. Multaj en la vilaĝo perdis sian vivrimedon, ne povis nutri sian familion kaj devige vagadis aliloken.

Dank’ al la revolucia amasa kritiko, la Longkiaŭ-anoj pli klare distingis la limon inter socialismo kaj kapitalismo, levis sian konscion pri la batalo inter klasoj kaj du linioj, kaj pli firmigis sian decidemon por strebi al prospero.

Dum la tempo de “du urĝaj taskoj” en 1969, nome rikolto de tritiko kaj transplantado de plantidoj de frua rizo, oni devis kulturi fruan rizon sur la tuta spaco de la rizkampoj sed la disponebla tempo estis mallonga, tio postulis koncentritajn laborfortojn. Krome estis varma kaj ŝanĝigema vetero, kaj la rikolto de tritiko estis iom prokrastita pro ne sufiĉe alta temperaturo dum ĝia maturiĝo, tiel ke la laboro de rikolto kaj transplantado estis ankoraŭ pli streĉa. Sed, la malfaciloj ne povis timigi la Longkiaŭ-anojn. La revolucia komitato de tiu brigado unue organizis la vastan amason de komunumanoj studi la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ “Mi aprobas tiun sloganon, nome ‘timi nek malfacilojn nek morton’”, kaj la brilajn “tri popularajn artikolojn” kaj samtempe kritiki la “filozofion de vivkonservo” de Liu Ŝaŭki. Dank’ al tiu studo kaj revolucia amasa kritiko, la kadroj kaj amasoj ekkonis, ke

la revolucia spirito “timi nek malfacilojn nek morton” estas la plej alta normo de revoluciigo de ideologio kaj potenca ideologia armilo por venki ĉiujn malfacilojn kaj akiri riĉan rikolton en agrokulturo. Tial, aperis kortuŝa sceno en la batalo por plenumo de la “du urĝaj taskoj”, ke oni luktis tagnocte, falĉante tage kaj draŝante nokte. Kiam al Ŝen Laŭtu, aktivulo de viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ de la tria produkta grupo, la piedoj estis frotvunditaj, kaj aliaj komunumanoj admonis lin al ripozo, li diris: “Mi preferas esti haŭtodefrotita ol iom malpli labori.” Li persiste laboregis kune kun la aliaj ĝis la finplenumo de la “du urĝaj taskoj”.

SCIENCA AGROKULTURADO

Por kiel eble plej rapide plenumi la bataltaskon de ĉiam pli alta produkto, la vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longkiaŭ-brigado urĝe volis kulturi kampojn science en la produkta batalo. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, ili jam elkulturis multajn “lokajn specialistojn” kun riĉa sperto en praktika laboro. Vive studante kaj vive aplikante verkojn de Prezidanto Maŭ, tiuj faris grandakvante en lastaj jaroj malfacilajn esplorajn laborojn en plialtigo de kulturaj teknikoj, reformo de kultura sistemo, reciproka kunordigo de kulturataj plantoj, scienca kunordigo de diversaj specioj en kul-



Komunumaninoj de la brigado ĝoje laboras ĉe degrajniloj.

turado, ktp. Ili donas, unuflanke, atenton al heredo de tradiciaj kulturaj spertoj kaj, aliflanke, senĉese resumas novajn praktikajn spertojn, elirante el reala stato de produkto. Per tio ili kontribuis al la riĉaj rikoltoj de la brigado.

En sudo de Jangzi-rivero oni ĝenerale aplikas en kulturado la sistemon de du rikoltoj de tritiko kaj rizo. Kiam tiu brigado aplikis la sistemon de tri rikoltoj, aperis multaj kontraŭdiroj en produktado: la malnovaj specoj de plantoj bezonas longan kreskan periodon kaj antaŭe kulturataj plantoj influas malfavore al la poste plantataj, kiuj siavice malfaciligas la laborarandon por la venonta jaro; la rikoltaj laboroj estas sufiĉe koncentritaj, kaj tio kaŭzas nesufiĉon de laborfortoj, ktp. Por solvi tiujn kontraŭdirojn, oni ne povis ne fari sciencajn eksperimentojn. Tiel, estis organizita agrokultura scienca eksperimenta grupo de triflanka kombiniĝo el malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, lokaj teknikistoj kaj revoluciaj kadroj. Post multfoja kaj ripetada eksperimentado de pli ol 200 plantospecioj, ĝi fine per sia revolucia kreema spirito solvis sukcese la problemon ne solveblan por la "fremdlande edukitaj specialistoj" kaj eltrovis racian aranĝadon por kulturaj grenplantojn kun tri rikoltoj en jaro, inter kiuj du rikoltoj estas de rizo. Rezulte de tio estis rompita la kultur-sistemo de du rikoltoj de rizo kaj tritiko en jaro formita de etkamparana mastrumo de

miloj da jaroj, kaj riĉa sperto estis kreita por atingi pli altan produkton sur la bazo de jam atingita altprodukto.

Ĉar tiu brigado plantas rizon por du rikoltoj en jaro centpocente sur siaj rizkampoj, la ĝustatempa aranĝo de kulturaj laboroj konforme al la loka klimato postulas pli fruan kulturon de plantidoj. Kiel konkeri tiun malfacilon en tekniko? Alfrontante tiun problemon, la scienca eksperimenta grupo iris al aliaj lokoj por lerni la sperton de kulturado de plantidoj sur tero sen akva surkovro. Kiam ili faris la unuan provon en 1969, la temperaturo estis malalta. Ili zorge faris la kulturadon de rizplandidoj, ne timante penadon kaj laciĝon, kaj plenumis sukcese sian taskon.

En la lastaj jaroj, la "lokaj specialistoj" pri agrokultura tekniko de tiu brigado plimultiĝis ĝis la nombro de pli ol 140, inter kiuj pli ol 30 estas invititaj al Hunan, Hubej, Ŝandong kaj Ŝanhajo por disvastigi sian progreseman sperton.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj vastaj revoluciaj amasoj de Longkiaŭ-brigado ne kontentas pri siaj atingoj jam akiritaj, kiel ili mem diris: Ni terkulturas por la revolucio, kiam la grenprodukto akiras altan produkton, ankaŭ nia ideologio devas pli kaj pli levigi, kiel la floroj de sezamo. Ni devas pliprodukti grenon kaj pliigi nian rezervitan kvanton de greno kaj konstrui nian socialisman patrolandon ankoraŭ pli potenca.

La “Indiĝenaj Specialistoj” Bonvenigataj de la Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

Laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ “Klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado estas la tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencajn socialisman landon”, Dahing-komunumo de Ginggiang-gubernio, Giangsu-provinco starigis, de brigadoj ĝis produktaj grupoj, reton de sciencaj eksperimentaj stacioj de amasoj. Nemalmultaj agrikulturaj teknikistoj kulturitaj de la politika kaj produkta lernejo de la komunumo, kiuj samtempe partoprenas produkton, estas nomataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel iliaj propraj “indiĝenaj specialistoj”. Ili faris tre grandajn kontribuojn por disvolvi agrikulturan produkton. Sub la nutrado de Maŭzedongpenso tiu scienca trupo estas sane kreskanta.

La “indiĝenaj specialistoj” estas kaj teknikistoj kaj propagandistoj de Maŭzedongpenso. El ili nemalmultaj estas aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Jen “indiĝenaj specialistoj” studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.





El la amasoj kaj en la amasojn, "indiĝenaj specialistoj" ligas la teorion kun praktikado. Jen "indiĝenaj specialistoj" kune kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj intelektaj junuloj studas pri vintro pasigo de plantaĵo azolla imbricata.

(Dekstre sube):

La "indiĝenaj specialistoj" ligoĝas kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj koron kun koro, kondukas sciencan eksperimentadon kaj resumas sperton en produkto por disvastigi la sukcesan sperton kaj per tio direkti la aliajn. Jen bona rikolto de la kotono kulturita de la indiĝenaj specialistoj.

"Indiĝena specialistino" kaj intelekta junulino Ĝu Jufen (maldekstre) faras manipulan prezentadon.



"Indiĝenaj specialistoj" nud piede iras al kampo kaj tie kulturis eksperimentan modelan kampon kune kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.



Agrikultura Scienca Eksperimentado en Ĵongĝong

KIAM Ĵongĝong-brigado de Mejsan-komunumo de Fugian-provinco finis la duan sarkadon en la kampoj de malfrua rizo en aŭtuno de la lasta jaro, la sciencteknikaj grupoj de ĉiuj produktaj grupoj de la brigado tuj okupiĝis pri duafoja alŝprucigo de insekticido. Rigardante la oleo verdajn rizojn, komunumanoj diris ĝoje: “Ni kreskigis bonajn plantojn farinte agrikulturan scienca eksperimentadon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, kaj dank’ al la zorga flegado de la teknikaj grupoj la malfrua rizo certe donos denove bonan rikolton!”

La teknikaj grupoj laŭdataj de la komunumanoj estas organizaĵoj de scienca eksperimentado en agrikulturo formitaj el kadroj, maljunaj kamparanoj kaj junuloj de la brigado. Nun, tiu brigado havas sian centran teknikan grupon, kaj ĉiu el la dek produktaj grupoj sub ĝi havas po unu

teknikan grupon. De post sia fondiĝo en 1965, tiuj teknikaj grupoj gvidas la komunumanojn de la tuta brigado vaste disvolvi scienca eksperimentadon en agrikulturo kaj multe kontribuis en irigaciaj konstruoj, plibonigo de grundo, selektado de bonaj specioj, racia sterkado, elimino de fiinsektoj kaj akiro de riĉaj rikoltoj en 5 sinsekvaj jaroj.

Ĉe Ĵongĝong-brigado, la homoj estas multaj, dum la kampoj estas malmultaj. Meznombro ĉiu homo havas agron el nur 4 dekonoj da muo; cetere la kampoj estas aŭ sablozaj aŭ ŝlimecaj, facile atakeblaj de inundo kaj sekeco. Krome la plantitaj rizospecioj estis ne bonaj en la pasinteco, tial la rikoltoj estis tre malbonaj. En la jaro 1964, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon “lernu de Daĝaj en agrikulturo”. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj firme

La komunumanoj de la 9-a produkta grupo de Ĵongĝong-brigado studas verkon de Prezidanto Maŭ dum interlabora paŭzo.



La veterana malriĉkamparano Li Ĉeng-guan kaj junuloj de la scienc-teknika grupo faras esploron en la eksperimenta kampo.



respondis la alvokon kaj levis ardan amasan movadon lerni de Daĝaj la revolucionan spiriton de sinpogo sur propraj fortoj kaj penema luktado sub malfacilaj kondiĉoj por ŝanĝi la postrestintan fizionomion de Ĵongĝong. Kaj kun tio naskiĝis tiam ankaŭ la teknikaj grupoj.

Laŭ la postuloj de la “Okpunkta Ĉarto de Agrikulturo” elmetita de Prezidanto Maŭ koncerne al irigacio, sterko, plibonigo de grundo, selekto de bonaj specioj, konservo de akvo kaj tero, plibonigo de instrumentoj kaj surkampa prizorgado, la teknikaj grupoj starigis por si temojn de scienca eksperimentado. En la komenco ili ne havis sperton kaj iuj pensis, ke scienca eksperimentado estas nur problemo de produkta tekniko kaj sufiĉas diskonigi la rezultojn de eksperimentoj kaj doni admonojn en produktaj kunvenoj. Tamen, ili trovis poste, ke la bonaj spertoj el eksperimentado ne povas esti disvastigitaj pro granda rezistforto. Ekzemple, kiam la bona specio de frua rizo *ajĝiaŭnant* estis rekomendata, iuj diris, ke la nova specio ne estis plantita ĉe ili kaj ĝia produktokvanto ne estas tiel certa kiel tiu de la malnova specio. Iu produkta grupo daŭre hezitis pri planto de la ricevitaj plantidoj de la nova specio kaj perdis la tempon por transplantado. Al la plantidoj sur iuj kampoj elkreskis spikoj je dekelkaj tagoj post transplantado. Tio videble influos la produktan kvanton kaj pliigis la suspekton al la nova specio. Tiam la teknikaj grupoj organizis vizitadojn al progresintaj brigadoj kaj energie propagandis la avantaĝojn de agrikulturo entreprenata laŭ scienca maniero lige kun la aktuala praktiko. Samtempe, ili alprenis ĝustatempajn rimedojn de

aldono de sterko k. a. al la kampoj kie minacis malpliprodukto. Fine, la pomua produkto de la nova specio de rizo atingis 320 kilogramojn, je 28.5 kilogramoj pli alta ol la rekorda rikolto de la malnova specio. La meznombra pomua produkta kvanto de la produkta grupo, kie *ajĝiaŭnant* estis precipe disvastigita, eĉ atingis 422.5 kilogramojn, je 70-80% superante tiun de la malnova specio. Tiu fakto donis grandan edukon al la amasoj. Ili diris: “Antaŭe, ni parolis pri 500-kilogramama produktokvanto, sed ne kredis tion. Nun ni propraokule vidis tion.” Tiel la nova rizospecio estis plene disvastigita en la tuta brigado. El tiu okazaĵo ankaŭ la kadroj kaj la membroj de teknikaj grupoj ekkomprenis, ke same kiel ĉe aliaj laboroj, por disvastigi novajn teknikojn necesas ĝin gvidi per politiko, oni devas unue klare koni la gravecon de scienca eksperimentado kaj poste rompi la konservativajn pensojn per rezonado sur la bazo de faktoj konstatitaj en scienca eksperimentado kaj tipa praktika sperto, tiel ke la afero estas videbla, palpebla kaj ellernebla. De tiam, ĉiam kiam la teknikaj grupoj faras novan eksperimenton aŭ disvastigas novan teknikon, ili unue organizas la amasojn studi koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ por armi sian penson, kaj nova situacio de amasa partopreno de scienca eksperimento estis malfermita.

La amasa aktivado de agrikulturado laŭ scienca maniero disvolvita de Ĵongĝong-brigado elmontris sian grandan avantaĝon en konkero de serioza malsano kaj finsektoj de rizplantoj. Ĉe Ĵongĝong-brigado la malutilo kaŭzita de malsano kaj finsektoj estis kompare pli serioza en la pasinteco,

kaj oni ne trovis efikan rimedon kontraŭ fiinsektoj. En 1963, kiam la frua rizo de la brigado suferis seriozan atakon de rizpiralidoj, oni ne sufiĉe propagandis pri ekstermado de la fiinsektoj en scienca maniero por mobilizi la amasojn al la laboro, sed konfidis nur al malmultaj teknikaj laborantoj por apliki insekticidon. Rezulte, la fiinsekta damaĝo rapide disvastiĝis, tiel ke 29.5% de la kulturata tero de la tuta brigado estis atakitaj. Kvan- kam post tiu leciono, ĉiuj produktaj grupoj senes- cepte asignis specialan personon por zorgi pri ekstermo de fiinsektoj, tamen la prezo de insekticido estas alta, sekve ĝia grandskala uzado estas iom ŝarĝa en ekonomio, kaj cetere, dum la plej intensa periodo de la insekta malutilo, ofte ankaŭ insekti- cido ne helpas, por ne paroli pri ekstermo de insektaĵoj. Post sia fondiĝo, la teknikaj grupoj inter- konsiliĝis kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por trovi rimedon kontraŭ mal- utilaj insektoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“Armitoj estas grava faktoro en milito, sed ne la decida faktoro; tio, kio decidis, estas homoj sed ne objektoj”**, ili rompintis plene la rutinon de la agrikul- turaj “specialistoj”, kiuj prenis insekticidon kiel so- lan rimedon kontraŭ fiinsektoj, kaj aplikis reale praktikeblan rimedon de insektekstermado per homa forto kun prevento kiel ĉefa rimedo. Ĉiufoje post falĉado de rizplantoj, oni forbruligis la stum- pojn, al kiuj ofte alteniĝas insektaĵoj, por sterki la kampon. Semoj estas steriligitaj antaŭ semado. En 1969, pro malbona vetero, la transplantado estis prokrastita. La influataj 500 muoj da rizplantoj de la specio *ĝenĝu-aj* estis videble atakotaj neeviteble de rizpiralidoj. La brigado mobilizis siajn mem- brojn kolekti en la kampoj ovbulojn de la insektoj, kapti la rizpiralidajn papiliojn kaj elradiki vel- kintajn plantojn kaj forpluki blankajn spikojn. Nokte ili allogis la papiliojn per lamplumo por ilin mortigi, kaj dum serena tago ili aplikis ankaŭ insekticidon en konvena kvanto. Tiel piralidoj estis ekstermitaj, antaŭ ol ili povis fari grandan damaĝon. Rezulte, la pomua produktokvanto de frua rizo superis 385 kilogramojn.

En scienca eksperimento en agrikulturo, necesas alpreni de konvenaj rimedoj konformaj al la lokaj kondiĉoj. En la pasinteco, Ĵongĝong-brigado ricevis plantidojn de batato de aliaj lokoj. La rikolto ofte estis nebona pro malboneco de plantidoj aŭ malfruigita plantado. Por solvi tiun problemon, la teknikaj grupoj mem kreskigis plantidojn laŭ la postulo de la partia filio de la brigado. Komence, la enterigitaj batatpecoj longe ne ĝermis. Post ripetada eksperimento kaj serioza resumo de sperto, ili trovis ke la malsukceson kaŭzis malalta

temperaturo en grundo. Ili do uzis plastan mem- branon por altigi la temperaturon en grundo kaj akceli la ĝermadon. Tio fine sukcesis. La pro- duktkvanto de tia batatplantido estas ĉ. unuoble pli alta ol tiu de antaŭa plantido. Nun, la temoj kaj metodoj de eksperimentoj estas elmetataj de mal- riĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭ la lokaj realaj cirkonstancoj. Tiel la eksperimentoj trovas ĉies prizorgon kaj ankaŭ la akirita sperto trovas pli rapidan kaj pli vastan aplikadon. En la lastaj kvin jaroj, sub la klopodo de malriĉkam- paranoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj tek- nikaj grupoj, tiu brigado efektiviĝis raciajn alter- nigon kaj intersekvigon de plantaĵoj, plenan utiligon de kampoj, zorgeman kaj detalan kulturadon kaj racian sterkadon kaj plie sukcese disvastigis tri novajn speciojn de frua rizo kaj du novajn speciojn de malfrua rizo konvenajn por la lokaj kondiĉoj. Rezulte de tio, la produkta kvanto ĝenerale pliiĝis je 50-100%, kaj krome aperis altproduktaj kampoj, sur kiuj unu rikolto de greno atingis 500 kilogra- mojn. La totala grena produktokvanto de la brigado kreskis de 225 tunoj en 1963 ĝis 475 tunoj en 1968. La brigado, al kiu antaŭe ne sufiĉis la greno memprovizado, fariĝis brigado povanta vendi superfluan grenon al la ŝtato. Ni cetere liveras al la ŝtato kaj najbaraj brigadoj semojn de bonaj specioj de rizo kaj bonspeciajn batatajn plantidojn.

En la lastaj jaroj, prospere disvolviĝis en Ĵong- ĝong-brigado amasa movado de scienca eksperi- mentado en agrikulturo, kaj pli ol cent komun- manoj, kiuj havas riĉan sperton en produkta praktiko, ekposedis certajn sciencajn kaj teknikajn sciojn. Li Ĉengĝuan, estro de produkta grupo, kiu estas maljuna kamparano kaj antaŭe havis nur riĉan praktikan sperton, iom post iom ekposedis la teknikon de selektado de bonaj specioj de rizo kaj batato dum sia partopreno en scienca eksperi- mentado. Nun li respondecas speciale pri la la- boro de selektado de bonaj specioj de la tuta brigado. Multaj intelektaj junuloj, revenintaj al la kamparo, ankaŭ ellernis agrikulturajn tekni- kojn, kiaj plugado, transplantado kaj surkampa flegado de plantoj dank' al la helpo de maljunaj kamparanoj, tiel ke ili kombinis siajn librajn sciojn kun produkta praktiko kaj ludis sian aktivan rolon. Ankaŭ la vastaj amasoj de komunumanoj akiris certajn novajn teknikojn dum la praktiko de scienca agrikulturo. Nun ili konscie partoprenas sciencan eksperimentadon en agrikulturo por fari pli grandajn kontribuojn en la socialisma konstruado de la patrolando.

Aromas Floroj

en

Hukiu-komunumo

PRETERPASANTE surtrajne la monteton Hukiu en Suĝoŭ laŭ la fervojo inter Ŝanhajo kaj Nankino, oni povas vidi de malproksime tra fenestro de vagono pitoreskajn vitrodometojn kaj vastajn areojn da florarboj. Tie estas Hukiu-komunumo, fama en nia lando kiel produktejo de tearomigaj floroj.

En la komunumo troviĝas 7-8 produktaj brigadoj, kiuj kultivas tiajn florojn, kaj el tiuj, tamen, la produktaj brigadoj Ĉahua kaj Hukiu kultivas ilin plej multe. Ĉi tie, krom jasmeno, oni kultivas ankaŭ *dajdaj*-florojn (*citrus aurantium*) kaj miĉelion (*michelia champaca*). Per mikso de tiuj floroj en unuapaŝe prilaboritan verdan aŭ nigran teon, oni produktas aroman florteon. Esenco tirita el tiuj floroj estas uzata ankaŭ en tualeta sapo, manĝaĵoj k. a.

Kiom multe da floroj estas en Hukiu-komunumo! Florarboj kultivataj en vazoj staras dense en longaj vicoj sur la kamparo kaj ties finojn oni ne povas vidi. La arboj de *dajdaj*-floroj liveras ne nur florojn por prepari florteon, sed iliaj fruktoj estas ankaŭ uzataj kiel medikamento. La trunko de miĉelio estas alta je 5-6 metroj. Promenante sub la arboj, oni sentas sin iranta libere kvazaŭ en arbaro. Same kiel aliaj florarboj, ili estas kulturataj en emajlitaj fajencaj vazoj de diversaj grandoj, kiuj viciĝas bonorde sur la kamparo. Ĉar tiuj florarboj estas altaj, komunumanoj faras sub ili multajn laborojn el bambuoj, sur kiuj oni kolektas la florojn dum la sezono de plena florado de miĉelio. Ma Ĉangŝun, vicĉefkomitatano de la komunuma revolucia komitato, diris



Komunumanoj kolektas tearomigajn florojn.

al mi, ke en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la produktado de floroj multe disvolviĝis, ekzemple, nun la komunumo kultivas pli ol 478,000 jasmenajn arbojn.

Komunumanoj nomas la supre menciitajn vitrodometojn "floraj ĉambroj". Plejparto de tiuj dometoj estas konstruitaj de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj post la fondiĝo de la popola komunumo per la kolektiva forto. La tegmento kaj sunflanka muro de tiaj "floraj ĉambroj" estas vitraj, kaj travintras en tiaj forcejoj la jasmenaj kaj miĉeliaj arboj. En la komunumo estas pli ol 1,600 tiaj forcejoj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la komunumanoj multe altigis sian konscion pri klasbatalo kaj pri batalo inter la du linioj, kaj en la batalo por akiri riĉan rikolton de floroj ili venkis multajn malfacilojn en kultivado de la floroj plene

disvolvante sian revolucian energion. Ekzemple, miĉelio estas tre delikata florarbo, kiu timas kaj varmon kaj malvarmon. Sub la arda suno, ĝiaj folioj ofte velkas, se oni malfrue akvumas ĝin je kelkaj minutoj. En frosta vintro, ĝi difektiĝas de malvarmo, se la pordo aŭ fenestro de "flora ĉambro" estas fermitaj ne sufiĉe strikte. Akvumante la florarbojn, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiam prenas la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ "tri popularaj artikoloj" kiel spegulon por ekzameni sian laboron kaj fari ĝin ĉiam pli bone, tiel ke la produkta kvanto de la floroj kreskas jaren post jaro.

Dum mia vizito al la brigadoj Ĉahua kaj Hukiu, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rakontis al mi sian amaran vivon antaŭ la Liberiĝo. Tiam, sub la regado de kuomintangaj reakciuloj, bienuloj kaj kapitalistoj posedis plejparton de la tero kaj florarbojn. Ili kruele ekspluatit florkultivistojn per diversaj metodoj. Unu el iliaj artifiko estis aĉeti florojn, uzante nenormajn pesilojn, la alia estis "sufoki la prezon": En la rikolta sezono de floroj, bienuloj kaj fikomercistoj komplotis inter si kaj intence rifuzis aĉeti florojn de kamparanoj per diversaj pretekstoj. Tio estis tre venena manovro. Timante difektiĝon de siaj rikoltitaj freŝaj floroj, la florkultivistoj povis nur fari oferton al la bienuloj kaj fikomercistoj je multe reduktita prezo. Tiel, post tutjara peniga laborado, la kamparanoj ankoraŭ ne povis perlabori sufiĉe por satigi sin, kaj devis pruntepreni monon je uzuro ĉe bienuloj kaj kapitalistoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris indigne: Antaŭe, sur la kapo de florkultivistoj estis tri glavoj: nenorma pesilo, sufoko de prezo kaj uzuro. Sub tiuj tri glavoj, sekigis la sango de florkultivistoj. Tio profunde figuras la mizeran vivon de florkultivistoj en malsato kaj frostoj antaŭ la Liberiĝo. Nun, sur la bordo de la rivero Ŝantanghe proksime al Hukiu-komunumo la ŝtato establis aĉetstacion de tefloroj. En la rikolta sezono de floroj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj portas tien florojn per boatoj por vendi ilin al la ŝtato. La prezo difinita de la ŝtato estas tre stabila kaj la vivo de la komunumanoj fariĝas pli kaj pli bona. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj esprimis: "Ni starigos en ni la penson kultivi florojn por la revolucio kaj firme iros la larĝan socialisman vojon montritan de Prezidanto Maŭ."

Ĉie en Hukiu-komunumo ŝvebas la ardomo de floroj, sonas laŭte revoluciaj kantoj kaj regas la atmosfero de abunda rikolto.

JANG ZONG*:

La Suno la Tutan Altebe

*Prezidanto Maŭ — la brila ruĝa suno —
Banas la neĝmontojn kaj stepojn per lumo.
Jen pokalo plena de sekala vino
Por vin beni per eterna viv' sen fino.*


Tiu ĉi popolkanto esprimas la komunan deziron de ni milione nombraj liberigitaj tibetaj servutuloj. En la nunaj feliĉaj tagoj, ni ankoraŭ klare memoras, kia homa infero estis Tibeto, kiam ĝi estis sub la regado de la plej reakcia, plej malluma, plej barbara kaj plej kruela feŭda servuta sistemo antaŭ la Liberiĝo. Tie la imperiistoj arogante tiranis kaj la kuomintangaj reakciuloj furioze subpremis kaj barbare prirabis la popolon. La regantoj, temploj kaj aristokratoj pezis sur nia dorso kvazaŭ grandaj montoj, kaj diversaj devigaj servoj suĉis nian sangon kaj mordis nian karnon kiel vampiro kaj vipuro. Ni servutuloj kvankam multe ŝvitis kaj sangis por kulturebliki multajn kaj multajn kampojn, tamen ni mem ne posedis eĉ pinĉprenon da tero; kvankam ni diligente paŝtis sennombrajn gregojn da bovoj kaj ŝafoj, tamen ni mem ne posedis eĉ unu laneron. Al ni apartenis nur niaj propraj ombroj kaj ni povis postlasi nur niajn piedsignojn. Tio, kion ni ricevis, estis nur la ekstreme barbarajn punojn, kiaj elpreno de okuloj, fortranĉo de nazo, eltiro de tendenoj kaj forigo de haŭto. Mia patro plenumis servojn por mastroj ĉiujare de la jarkomenco ĝis la jarfino kaj surdigis sub la turmentado de tro pezaj laboroj. Mia patrino naskis kvin infanojn, sed tri el ili mortis pro malsato. Mia plijuna frato komencis servi kiel porkopaŝtisto por mastro en la aĝo de kvin jaroj kaj fariĝis mutulo sub la forta batado fare de la mastro. Kiam mi havis ok jarojn, mi komencis plenumi servojn por mastroj kaj ĝis nun ankoraŭ restas sur mia

Lumigas Tibetan nejon

korpo cikatroj postlasitaj de skurĝoj de la mastroj. En la mallumaj jaroj, kio torentis en la muĝanta Jalucang-po-rivero, estis la sango kaj larmoj de ni servutuloj, kaj kio formis la altajn Himalajojn, estis niaj indigno kaj malamo!

Tage kaj nokte ni sopiradis kaj sopiradis kaj fine al ni venis la savanto Prezidanto Maŭ. Li alsendis la liberigan armeon, kaj tiu starigis la majestan, belan kvinstelan ruĝan flagon sur Himalajoj. Prezidanto Maŭ gvidis nin faligi la monte-
gojn, kiuj peze kuŝis sur nia dorso, frakasi la katenon de nacia subpremado kaj forpeli hommanĝajn lupojn. Prezidanto Maŭ ellaboris brilajn naciajn politikojn, laŭ kiuj la tibeta popolo ĝuas nacian egalrajtecon kaj regionan aŭtonomecon.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“En analizo ĝis la fino, nacia batalo estas problemo de klasbatalo.”** Tiu granda instruo de Prezidanto Maŭ estas lumturo kiu direktas la diversnaciajn popolojn de nia lando marŝi antaŭen. Tibeto estas regiono, kie loĝas multaj naciminoritatoj, kaj plenmano da klasaj malamikoj en- kaj ekster-landaj tutforte kovras la klasajn kontraŭdirojn kaj plivastigas la naciajn kontraŭdirojn por krei naciajn splitigojn kaj detruai la unuecon de nia patrolando. Ni devas firme teni la ĉefĉeneron de klasbatalo kaj decideme frakasi la restaŭran intrigon de ĉiuj klasaj malamikoj. Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, miliono da liberigitaj servutuloj faris intensan atakon kontraŭ la klasaj malamikoj kaj igis Tibeton



La verkinto de tiu ĉi artikolo Jang Zong (dekstre en la antaŭa vico) studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun komunumanoj ĉe kampo.

marŝi grandpaŝe sur la larĝa vojo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, unuiĝante kun la klasaj fratoj han-aj kaj alinaciaj kaj sin apogante sur la granda Popola Liberiga Armeo.

Pace liberiĝis Tibeto, sed tio ne signifas pacon, ĉar neniam ĉesis la intensa batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. La en- kaj ekster-landaj malamikoj ne volontis akcepti sian malvenkon kaj ĉiam revis restarigi sian reakcian regadon. Ne sukcesinte en sia intrigo malhelpi al la Popola Liberiga Armeo la liberigon de Tibeto, la reakcia servutulposedanta klaso kun Dalai-lamao kiel sia reprezentanto faris armitan ribelon en komploto kun la usona imperiismo kaj hindaj reakciuloj. Sub la apogo kaj instigo de la usona imperiismo kaj moderna reviziismo, ankaŭ la hindaj reakciuloj faris armitan atakon kontraŭ la sudokcidenta landlima regiono de nia lando. Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, la granda Popola Liberiga Armeo kaj diversnaciaj revoluciaj popoloj de Tibeto unuspire likvidis la armitan

ribelon kreitan de la naci-perfidan klikon estratan de Dalai-lamao kaj frakasis la intrigon de ekspansio de la hindaj reakciuloj. Sekvante la grandan doktrinon de Prezidanto Maŭ pri klaso kaj klas-batalo kaj liajn brilajn naciajn politikojn, la milione nombraj tibetaj liberigitaj servutuloj kondukis demokratian reformon, frakasis la feŭdan servutan sistemon kaj starigis popolan regpotencon, tiel ke Tibeto enpaŝis en novan epokon de socialismo.

La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Tibeto spiris tra la samaj naztruoj kun la reakciaj feŭdaj servutulposedantoj. Ili reprezentis la interesojn de imperiistoj, kuomintangaj reakciuloj kaj feŭdaj servutulposedantoj, komplotis kun la naciperfida kliko de Dalai-lamao kaj plenmano da perfiduloj, spionoj kaj aliaj kontraŭrevoluciuloj, furioze opoziciis serion da brilaj naciaj politikoj de Prezidanto Maŭ kaj la liberigitajn servutulojn iri la vojon de agrikultura kooperigo montritan de Prezidanto

Maŭ, energie klopodis revivigi la renversitan feŭdan servutan sistemon kaj intencis splitigi nian grandan patrolandon, por ke la vastaj liberigitaj servutuloj denove falu en abismon de mizero.

Ni liberigitaj servutuloj firme sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ kaj iris la socialisman vojon laŭ la direkto **“Organiziĝu”** de li montrita. En malpli ol unu jaro post la demokratia reformo estis organizitaj 22 agrikulturaj kooperativoj en Giaĉa-gubernio, el kiuj kvin estis en nia subdistrikto. Ĝuste kiam ni marŝis antaŭen laŭ la vojo de socialismo kun treege granda socialisma entuziasmo, Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Tibeto, respondante al la kontraŭĉina ĥorado de la imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj kaj konspirante kun la reakciaj servutulposedantoj, senbride kriaciis, ke la kooperativoj fondiĝis **“tro frue”**, funkcias **“fuŝe”**, kaj devas **“desurĉevaliĝi”**. Ili grandkvante forhakis agrikulturajn kooperativojn, forte blovis la venton de individua mastrumado, distrustpetis **“kvar liberojn”**, intencante retroigi la historion. La agentoj de Liu Ŝaŭki en Tibeto eĉ venis persone al nia subdistrikto, protektis fiulojn kaj atakis bonajn homojn por detruiri la socialisman kolektivan ekonomion. Ili malpermesis al ni funkciigi kooperativon kaj eĉ minacis min per eksigo el la Partio.

Sed ni liberigitaj servutuloj armitaj per Maŭzedongpenso timis nenion. Nenia bato aŭ minaco povis ŝanĝi nian firman volon iri la socialisman vojon. En printempo de 1966, nia subdistrikto starigis la unuan popolan komunumon en la gubernio. Ĉe la fondiĝo de la popola komunumo, ni esprimis nian decidon al Prezidanto Maŭ: Sur la larĝa vojo de socialismo ni nepre marŝos antaŭen senhalte de generacio al generacio kiel la torentanta rivero Jalucangpo.

Sed ni liberigitaj servutuloj armitaj per Maŭzedongpenso timis nenion. Nenia bato aŭ minaco povis ŝanĝi nian firman volon iri la socialisman vojon. En printempo de 1966, nia subdistrikto starigis la unuan popolan komunumon en la gubernio. Ĉe la fondiĝo de la popola komunumo, ni esprimis nian decidon al Prezidanto Maŭ: Sur la larĝa vojo de socialismo ni nepre marŝos antaŭen senhalte de generacio al generacio kiel la torentanta rivero Jalucangpo.

Tibeto, kiu en la pasinteco ne havis sian ŝpinteksan industrion, konstruis sian unuan lanan ŝpinteksejon en la Granda Proletara Kultura Revolucio. Jen angulo de la ŝpinteksejo.





Liberigitaj servutuloj antaŭurbaj de Lhasa rikoltas sekalon.

Kvazaŭ printempa tondro, la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ vigle disvolviĝis sur la vasta altebenejo. Tio estas morta lukto inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Por eviti sian fatalan pereon, plenmano da renegatoj, spionoj kaj ĝismorte pentorifuzantaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon energie intrigis por restaŭro de feŭdismo utiligante religion kaj superstiĉon, kaj semis malakordojn inter ni liberigitaj servutuloj kaj han-aj klasaj fratoj por splitigi niajn revoluciajn vicojn kaj nian grandan socialisman patrolandon. Ni liberigitaj servutuloj plej amas Prezidanton Maŭ, plej aŭskultas lin, kaj levis revolucionan uraganon sur la tibeta altebenejo, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ **“Vi devas zorgi pri la ŝtataj aferoj kaj konduki la Grandan Proletaran Kulturen Revolucion ĝis la fino”**, alte tenante la grandan standardon **“Pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj”**. Ni forte kritikis la damnindajn krimojn

de Liu Ŝaŭki kaj liaj komplicoj pri restaŭro de kapitalismo kaj feŭda servuta sistemo, malkaŝis kaj batis plenmanon da kontraŭrevoluciuloj, kiuj intencis splitigi nian socialisman patrolandon kaj detrui nian nacian unuiĝon, akiris novajn venkojn en revolucio kaj venigis la ruĝan regpotencon.

La tuta historio de Tibeto de post la Liberiĝo estas historio de akra klasbatalo. Ĝi plene evidentiĝis, ke nacia problemo povas esti solvita nur pere de klasbatalo kaj revolucio. En nia granda socialisma patrolando, la unueca penso por ĉiuj nacioj estas Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso; la komuna vojo estas vojo de socialismo kaj komunismo. Ĉiuj kiuj oponas Maŭzedongpenson kaj subfosas la socialisman aferon, estas niaj malamikoj; ĉiuj kiuj subtenas Maŭzedongpenson kaj iras la socialisman vojon, estas niaj amikoj. Se ni nur persistas pri la vidpunkto de klaso kaj klasbatalo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj ĝuste observas kaj traktas la naciajn problemojn, ni estas ĉiam nevenkeblaj.



La tibetaj liberigitaj servutuloj senlime amas Prezidanton Maŭ, ili ĉiam kantas sian bondeziron — senlime longan vivon al Prezidanto Maŭ.

Maŭzedongpenso estas senprecedence vaste popularigita en Tibeto, kaj la altebenejo jam fariĝis granda lernejo por vive studi kaj vive apliki la verkojn de Prezidanto Maŭ. En ĉiu vilaĝo kaj en ĉiu tendo oni povas vidi brilajn portretojn de Prezidanto Maŭ kaj scenojn de viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Fariĝis ĉion laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ jam fariĝis konscia agmaniero de ĉiu homo.

Sub la lumigo de Maŭzedongpenso la nova generacio de Tibeto sane kreskas. Miloj kaj miloj da liberigitaj servutuloj glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en la intensa klasbatalo. Multaj reprezentantoj de la liberigitaj servutuloj estis elektitaj en revoluciajn komitatojn de diversaj niveloj por bone teni kaj bone uzi la regpotencon por la proletaro. Eĉ mi, sklavineto en la malnova socio, glorie ĉeestis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Partio kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton de diversaj nacioj Prezidanto Maŭ. Tio, kion oni antaŭe ne kuraĝis revii eĉ en sonĝo, nun efektiviĝis sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ.

Kiam la miliona liberigita servutularo ekposedis Maŭzedongpenson, ili tuj disvolvis potencon forton en reformo de la socio kaj mondo. Ni rompintis superstiĉojn, pensis kaj agis kuraĝe; ni ebenigis krutaĵojn, konstruis ŝtuparajn kampojn kaj fine sukcesis planti sekalon en regionoj altaj kaj malvarmaj. La antaŭe malsata stepo nun jam fariĝis herboza paŝtejo, kie paŝtiĝas nun amase bovoj kaj

ŝafoj, kie la produktokvanto de greno kaj nombro de brutoj senĉese kreskas. Dum la tempo de reaktiva servuta sistemo, Tibeto ne havis eĉ unu industrian laboriston kaj ne povis produkti eĉ unu simplan ŝraŭbon. Hodiaŭ el ni liberigitaj servutuloj jam kreskas la unua generacio de industriaj laboristoj, kiuj konstruis modernajn fabrikojn en montvaloj kaj en lokoj plenaj de sablo kaj ŝtonoj. En Tibeto estas sennombraj montoj kaj tiel la trafiko estis ekstreme malfacila en la pasinteco, sed nun ŝoseoj ĝenerale trapasas ĉiujn guberniojn. Samtempe kun tio, disvolviĝis ankaŭ socialismaj kultura, eduka kaj higiena aferoj kaj rezulte de tio tute ŝanĝiĝis ĝia postrestinta fizionomio.

Retrorigardante la brilan vojon, kiun ni liberigitaj servutuloj trairis sekvante Prezidanton Maŭ, ni sentas nian koron plena de ĝojo de venko. Ni profunde komprenas, ke nur dank' al Prezidanto Maŭ, ni havas novan Ĉinion kaj novan Tibeton. Strikte sekvi Prezidanton Maŭ ja signifas feliĉon kaj venkon.

Ni nepre plifortigos plue la grandan revolucion unuiĝon de diversaj nacioj de nia lando surbaze de Maŭzedongpenso, centoble pliigos nian revolucion singardemon kaj ĉiam estas pretaj ekstermi invadantojn kaj defendi nian grandan socialisman patrolandon.

**La verkinto de tiu ĉi artikolo estas ĉefkomitatano de la revolucia komitato de Hianfeng-popolkomunumo en Giaĉa-gubernio, Tibeto.*

En la Tagoj Kiam Ni Okupiĝis pri Esperantaj Laboroj en Jan-an

POST la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezist-milito, ni venis unu post la alia al Jan-an — la sankta loko de revolucio, al kiu ni jam delonge sopiris. Ni venis al Jan-an impulsite de la revolucia fervoro por savi la nacion kontraŭ la japana agreso kaj ne havis multajn sciojn pri revolucio. La 4-a de majo 1939 estas neforgesebla tago por ni dum la tuta vivo. Vespere de tiu tago ni havis la feliĉon vidi nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ sur placo en Jan-an kaj aŭskultis, kune kun miloj da jan-anaj junuloj, kompartianoj, batalantoj kaj kadroj de la Oka-voja Armeo, la paroladon havantan grandan historian signifon, kiun Prezidanto Maŭ faris sub la titolo *La Direkto de la Junulara Movado* en la memoriga kunveno okaze de la 20-a datreveno de la Movado de 4-a de Majo, okazigita tie de jan-anaj junuloj. Tiu parolado montris al ni ĉinaj junuloj la ĝustan direkton. Post la aŭskulto de la parolado de Prezidanto Maŭ, subite klariĝis al ni la menso. Ni ekkomprenis, ke intelektaj junuloj devas iri inter la laboristajn kaj kamparanajn amasojn, kombiniĝi kun ili kaj mobilizi kaj organizi la laboristajn kaj kamparanajn amasojn, kiuj konsistigas pli ol 90 procentojn de la tuta loĝantaro de la lando, kaj nur tiel la revolucio de Ĉinio povos venki.

Tiam ni estis junuloj kun aĝo de iom pli ol 20 jaroj. Post alveno al Jan-an ni estis senditaj por labori en la Jan-ana Esperantista Ligo sub la Jan-ana Kultura Asocio, pro ke ni povoscias Esperanton. Ni funkciigis esperantajjn kursojn en la Lusina Kolegio de Artoj, kiu troviĝis ekster la norda urbopordo de Jan-an, kaj en la oficejo de la Jan-ana Kultura Asocio. Krom tio, ni eldonis ankaŭ la *Jan-ana Esperantisto* en mimeografado kiu funkciis kiel ponto inter jan-anaj esperantistoj kaj la esperantistoj de la tuta lando.

En vintro de 1939, ni preparis Esperantan Ekspozicion, en kiu ni volis ekspozici kaj propagandi atingojn de Esperanto en ĝia praktika servo al la ĉina revolucio kaj monda revolucio en multaj sferoj (socia scienco, literaturo kaj arto, internacia propagando ktp). Antaŭ la okazigo de la ekspozicio ni aŭdis ke nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ loĝas en Janggialing nemalproksime de nia Ligo, kaj ke Prezidanto Maŭ aprobas la utiligon de Esperanto en servo al revolucio. Tial ni skribis leteron al Prezidanto Maŭ en la nomo de la Jan-ana Esperantista Ligo por peti lian surskribon al nia ekspozicio. Post kelkaj tagoj kuriero de Prezidanto Maŭ portis al ni la skribaĵon: **“Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucion, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.”**

Ricevinte la skribaĵon, en kiu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis al ni la direkton en lernado kaj uzado de Esperanto, ni sentis neesprimeblan ĝojegon. Ni legis kaj relegis la skribaĵon, gravuris ĝin vorton post vorto en nia koro. Por montri ĝin al la vastaj amasoj, ni metis ĝin en delikatan vitritan kadron kaj pendigis ĝin sur la plej grava kaj plej atentira loko en la ekspozicio.

La Esperanta Ekspozicio havis sian lokon sur la Okcidenta Monto ĉe la bordo de la rivero Janhe ekster la norda urbopordo. Ĝi okupis tri grandajn kavernoĉambrojn. Inter la ekspoziciitaj objektoj estis esperantaj tradukoj de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, kiaj *La Komunista Manifesto*, *Fundamentoj de Leninismo* k. a., de iliaj artikoloj pri literaturo kaj arto, materialoj de internacia korespondo, internacia propagando en servo de Esperanto al la revolucio de Ĉinio kaj al la revolucio de la mondo ktp.

Tiu ekspozicio estis tre bonvena al la vastaj amasoj de Jan-an. Inter la vizitantoj estis ne nur junuloj kaj mezaĝuloj, kiuj venis lerni aŭ labori en Jan-an el diversaj lokoj de la lando, sed ankaŭ maljunuloj. Inter la vizitantoj estis kompartianoj, revoluciaj kadroj, batalantoj de la Oka-voja Armeo kaj ankaŭ veteranaj revoluciuloj, kiuj partoprenis la Unuan kaj Duan Enlandajn Revoluciajn Militojn kaj la Longan Marŝon de 25,000 lioj. Nemalmultaj skribis en la notlibron siajn komprenojn kaj opiniojn pri Esperanto post la rigardo. Inter ili nemalmultaj de tiam komencis lerni Esperanton aŭtodidakte aŭ en esperanta kurso funkciigata de la Jan-ana Esperantista Ligo. Tiam, la Jan-ana Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato kaj la Lusina Kolegio de Artoj ekprenis Esperanton kiel nedevigan lecionon en sia kursaro. Kaj multaj povis kanti esperantajn revoluciajn kantojn.

Post la ekspozicio, ni publikigis la surskribon de Prezidanto Maŭ en la mimeografa gazeto *Jan-ana Esperantisto*, mane reproduktinte la aŭtografon, ĉar tiam ni ne havis aparaton de fotografa reprodukto. La gazeto estis sendita al diversaj lokoj en kontraŭjapanaj bazlokoj, al Ĉongking kaj Gulin, kiuj estis sub la regado de Kuomintango, al Ŝanhajo, kiu jam falis en la manojn de la japana imperiismo, al Hongkong kaj aliaj lokoj, kie troviĝis esperantaj organizoj aŭ esperantistoj, por ke ankaŭ ili ekkonu la surskribon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri Esperanto. Tiel

la surskribo de Prezidanto Maŭ estis diskonigita tra la lando, kaj tion eksciis ankaŭ iuj eksterlandaj esperantistoj. Post la Liberiĝo, ni trovis diversajn reproduktaĵojn de tiu surskribo en ĵurnaloj, lernolibroj, gazetoj ktp.

Kiam laboristoj de la Presejo de Oka-voja Armeo en Ansaj-gubernio, norda Ŝenhi, informiĝis pri la surskribo de Prezidanto Maŭ pri Esperanto, ankaŭ ili komencis lerni la lingvon kaj helpis nin eldoni la *Jan-anan Esperantiston* tipografie. Dank' al la pliprogesa preso ni povis pliigi ĝian kvanton kaj sendi ĝin ankaŭ al eksterlandaj esperantistoj. Ni raportis en ĝi pri la Komunista Partio de Ĉinio kaj la de ĝi gvidataj Oka-voja Armeo kaj Nova Kvara Armeo kaj pri la militaj atingoj kaj novaĵoj de diversaj kontraŭjapanaj bazlokoj. En ĝi estis aperigitaj la verko de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune* kaj aliaj artikoloj kondolencaj al Kamarado Norman Bethune, kiu oferis la vivon sur sia posteno. Dank' al nia raportado, legantoj en kaj ekster la lando informiĝis pri la reala stato de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj multaj eksterlandaj esperantistoj skribis al ni por esprimi sian simpatian kaj subtenon al la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio aŭ sian volon lerni de Norman Bethune, de lia granda internacia spirito.

En tiu tempo ni estis plene ŝarĝitaj per laboroj. Multaj el ni havis sian propran okupon krom la esperanta. Ili estis esperantistoj kaj samtempe poetoj, verkistoj aŭ muzikistoj. Multaj iris al la fronto pro bezono de la batalo kontraŭ la japanaj agresantoj, kaj iuj jam oferis sian karan vivon al la revolucia afero de la popolo. Tamen ni trovis tiam la laboron signifoplena, kvankam ĝi estis peniga. Ĉar ni havis nur unu komunan celon, nome: faligi la japanan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn kaj starigi novan Ĉinion.

*La aŭtoroj estas esperantistoj, kiuj iam laboris en Jan-an dum la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Parto el la esperantaj libroj kaj gazetoj siatempe konservitaj de la Jan-ana Esperantista Ligo.



为 革命 学习 世界語¹
 Wèi Gémìng Xuéxí Shìjièyǔ
 (por revolucio lerni Esperanto)

Lerni Esperanton por Revolucio

我开始学习世界語时，就学习了毛主席²对世界語
 Wǒ kāishǐ xuéxí Shìjièyǔ shí, jiù xuéxí le Máo zhǔxí duì Shìjièyǔ
 (Mi komenci lerni Esperanto kiam jam lerni Maŭ prezidanto pri Esperanta

Kiam mi komencis lerni Esperanton, mi jam lernis la skribaĵon de Prezidanto Maŭ pri la

工作的題詞。毛主席的教导給我指明了方向，我
 gōngzuò de tící. Máo zhǔxí de jiàodǎo gěi wǒ zhīmíng le fāngxiàng, wǒ
 laboro de skribaĵo Maŭ prezidanto de instruo al mi montri direkto mi

Esperanta laboro. La instruo de Prezidanto Maŭ montris al mi la direkton, kaj mi

一定为革命学习和使用世界語。
 yīdìng wèi gémìng xuéxí hé shìyòng Shìjièyǔ.
 definitive por revolucio lerni kaj uzi Esperanto)

definitive lernas kaj uzas Esperanton por revolucio.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj ĉiuj kvaraj linioj estas Esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj pri malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. 世界語 estas la nomo por Esperanto en la ĉina lingvo. 世界 signifas “mondo” kaj 語 signifas “lingvo”. Do, 世界語 signifas “mond-

lingvo”, sed ne “internacia lingvo”. Ĉar ni jam tiel nomis ĝin traduke, kiam Esperanto estis enkondukita en Ĉinion, sekve ĝi estas daŭre tiel nomata senŝanĝe.

2. En la ĉina lingvo, la titolo estas kutime metata post la nomo de koncerna persono, sekve, 毛 antaŭiras la titolon 主席 kontraŭe al la ordo en Esperanto. Same, “kamarado Vang” en Esperanto estas dirataj en la ĉina lingvo: 王同志 Wáng tóngzhì (Vang kamarado).

Nova Trompaĵo de Usono kaj Sovetunio

LA 7-an de oktobro, 1969, en la Konferenco de "Malarmado" de 25 landoj en Ĝenevo, reprezentantoj de Usono kaj Sovetunio kune elmetis projektan traktaton pri la t. n. malpermeso de instalado de nukleaj armiloj sur fundo de maroj kaj oceanoj. Tio estas nova paŝo de Usono kaj Sovetunio por rapidigi sian kunlaboron kaj nova trompaĵo por legitimi iliajn intensigitajn klopodojn en konkurado de nuklea armado sur marfundo.

Post kiam la Ĝenerala Asembleo de UNO, manipulata de ili, adoptis la t. n. "Traktaton pri Prevento de Nuklea Disvastigo" en junio de 1968, Usono kaj Sovetunio ellaboris tiun ĉi novan projektan traktaton post pli ol unujara postkulisa marĉandado, por pliapaŝe efektiviĝi ilian intrigon de nuklea monopolo, kaj trompi kaj paralizi la popolon de la mondo.


La komuna projekta traktato de Usono kaj Sovetunio estas centpocenta trompo, kvankam ĝi proklamas afekte "malpermeson de instalado de nukleaj armiloj kaj aliaj armiloj de amas-detruo sur fundo de maroj kaj oceanoj kaj en la grundo sub ili". Klarigante pri tiu projekta traktato en la konferenco je la 7-a de oktobro, reprezentanto de la usona imperiismo Leonard emfazis, ke laŭ la projekta traktato, submarŝipoj portantaj nukleajn armilojn "devas esti rigardataj same kiel ĉia ajn alia ŝipo", ke "tio ne malobservas la traktaton". Ja ĉiuj scias, ke Usono kaj Sovetunio nun intensigas siajn klopodojn por konstrui nukleajn submarŝipojn por fari nuklean ĉantaĝon. Sed la projekta traktato

difinas, ke submarŝipoj ne estas malpermesataj. Tio ĉi estas klara pruvo, ke la projekta traktato celas legitimi la aktivadojn de Usono kaj Sovetunio en sendo de iliaj nukleaj submarŝipoj kaj militaj flotoj por senbride galopi ĉie kaj senskrupule fari nuklean ĉantaĝon kontraŭ aliaj landoj.

En elkovado de tiu ĉi projekta traktato, la usona imperiismo insistis en tio, ke instalado de t. n. "konvenciaj armiloj" sur marfundo ne estu malpermesata. Klarigante la projektan traktaton, la reprezentanto de la usona imperiismo diris, ke ĝi "neniel malhelpas pacan uzadon de nuklea energio", tute ne "influas la pacan nuklean eksplodon". Tio signifas, ke Usono kaj Sovetunio povas rapidigi sian armeekspansion kaj militajn preparojn utiligante marfundon sub la kamuflo de "konvenciaj armiloj" kaj "paca uzado de nuklea energio".

La komuna projekta traktato de Usono kaj Sovetunio enhavas ankaŭ artikolon, kiu speciale difinas, ke ili "havas la rajton kontroli la aktivadon de aliaj landoj" sur marfundo. Tio ĉi estas intenco legitimi iliajn intensigatajn aktivadojn en kolektado de marfundaj informoj kaj utiligi la traktaton por establi sian hegemonion sur la marfundo kaj starigi tie militajn instalaĵojn.

Unuvorte, estas kristale klare, ke la komuna projekta traktato estas nenio alia ol nova intrigo ellaborita de la usona imperiismo kaj social-imperiismo kun la intenco establi sian hegemonion sur marfundo kaj akceli tie sian nuklean armeekspansion kaj militajn preparojn.



Dum sia vizito al la okcidenta Eŭropo kaj Azio, la ĉefo de la usona imperiismo Nixon ĉie renkontis fortan opozicion de la popoloj. Jen London-anoj manifestacias tenante sloganon tabulon "NIXON FORIRU HEJMEM!".

La Usona Imperiismo Putriĝas

Tagon post Tago

NUTAŬ

LA tagoj de la usona imperiismo estas ĉiam pli malfacilaj. Ĝi dronas en ĝenerala krizo politika kaj ekonomia kaj baraktas en malfaciloj en- kaj ekster-landaj ne povante trovi elirejon.

I

Post la fino de la Dua Mondmilito, sin apogante sur la ekonomiaj kaj militaj fortoj kiujn ĝi ŝveligis dum la milito, la usona imperiismo freneze faris agresojn kaj ekspansiojn, kun la ambicio starigis hegemonion super la tuta terglobo. Per kanonoj kaj usonaj dolaroj ĝi subtenas la reakciulojn de diversaj landoj, ludante la rolon de internacia ĝendarmo subpremanta la revoluciajn batalojn de la popoloj ĉiulandaj. Ĝi subskribis, kun 48

ŝtatoj aŭ pupreĝimoj starigitaj de ĝi, duflankajn aŭ multflankajn kontraktojn kaj formis militajn aliancojn. Ĝi starigis pli ol 2,000 militajn bazojn kaj instalaĵojn en aliaj landoj, kaj sendis agresan armeon nombrantan je pli ol miliono da personoj al pli ol 30 landoj kaj regionoj. En la pasintaj ĉirkaŭ dudek jaroj, ĝi kondukis ĉirkaŭ dek agresajn militojn kaj grandskalajn armitajn intervenojn kaj faris ĉiajn malbonojn.

Kvankam la usona imperiismo agis tirane kun ekstremaj feroco kaj krueleco, ĝi tamen ne sukcesis starigi la prisonĝatan hegemonion super la tuta terglobo. La agresoj kaj intervenoj de la usona imperiismo renkontis fortan reziston de diverslandaj popoloj, kaj precipe de tiuj de Azio, Afriko kaj

Latinameriko. Ĝuste kiel la granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: "La usona imperiismo tro longe etendis siajn brakojn. Ĉiufoje, kiam ĝi agresas iun lokon, ĝi metas novan maŝon ĉirkaŭ sian kolon." La agresaj kaj milita politikoj de la usona imperiismo movas la popolojn de diversaj landoj, tiel ke ili leviĝis kontraŭ ĝi, kaj tiamaniere ĝi metis sin en la lokon de la malamiko de la tutmonda popolo. La kontraŭusona tajdo envolvanta Azion, Afrikon, Latinamerikon kaj okcidentan Eŭropon ĵetis la usonajn imperiismajn agresantojn en senesperecon.

En la vastaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko furiozas revolucia ŝtormo, la subpremataj nacioj kaj popoloj unuj post aliaj prenis armilojn por oponi kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Plipotenciĝas kun ĉiu tago la armitaj bataloj de la popoloj de suda Vjetnamio, Laoso, Tajlando, Birmo, Malajo, Indonezio, Hindio, Palestino kaj aliaj landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.

Kien la agresaj fortoj de la usona imperiismo sin etendas, tie tajde leviĝas revolucia batalo, kaj tio ĉi jam fariĝis senescepta leĝo. Usono sendis cent milojn da agresaj armeanoj al suda Vjetnamio

por subpremi la revolucian batalon de la tiera popolo. Sed ĝi ricevis solidajn batojn de la heroaj armeanoj kaj popoloj de suda Vjetnamio kaj falis en grandan panikon. La usona imperiismo konstruis multajn militajn bazojn en Tajlando kaj sendis tien agresan armeon kun ĉirkaŭ cent mil soldatoj. Rezulte de tio, Tajlando fariĝis alia batalejo por bati la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn. La flamanta fajro de armita batalo de la tajlanda popolo brulas tra 33 el la 71 provincoj de la tuta Tajlando. En Mezoriento, la usona imperiismo instigis sian instrumenton Izraelo fojfoje lanĉi agresan militon kontraŭ arabaj landoj. Ĝuste en tia stato, la palestina popolo prenis armilojn kaj disvolvis vigrilan geriladon en la regionoj regataj de Izraelo.

La usona imperiismo dronas ĉiam pli profunde en ring-post-ringan sieĝon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj la revolucia popolo de la mondo.

II

La dekadenciĝo de la usona imperiismo respiguliĝas ankaŭ en la akuta malaltiĝo de ĝia pozicio en la kapitalisma mondo.



En la komenca periodo post la Dua Mondmilito, utiligante la malfortiĝon de la aliaj kapitalismaj landoj en la milito, la monopola kapitalo de Usono tute senkaŝe penetris en tiujn landojn, starigis kontroladon super siaj "aliancanoj" kaj metis Usonon en absolute superan pozicion en la kapitalisma mondo. En tiu tempo, Usono havis 70 procentojn de la rezervata oro de la kapitalisma mondo. La industria produkto de Usono okupis pli ol duonon de tiu de la kapitalisma mondo. Ĝia eksterlanda komerco okupis 31.7 procentojn de tiu de la kapitalisma mondo. Nun ĉio ĉi tio jam fariĝis historia pasintaĵo. En majo de la pasinta jaro, el la ororezervo de Usono restas nur 11 miliardoj kaj 100 milionoj da usonaj dolaroj, t. e. malpli ol duono de la sumo de 1949. Kaj tamen la uson-dolaraj monbiletoj tenataj de aliaj landoj superis la sumon de 35 miliardoj. Jam tute ŝanceliĝis la superrega pozicio de la usona dolaro en la kapitalisma mondo. Ankaŭ la procento de la usona industria produkto en tiu de la kapitalismaj landoj malaltiĝas senĉese. La intensa konkurado en la kapitalisma merkato jam reduktis la procenton de la usona eksterlanda komerco en tiu de la kapitalismaj landoj ĝis 16.6 procentoj en la jaro 1967. Post la grandskala malaltiĝo de la aktiva saldo en eksterlanda komerco en la lastaj jaroj, en la unua



Kriante "Frakasu la japan-usonan 'sekurecan traktaton'", "Malhelpu al Sato viziti Usonon" kaj aliajn sloganajn, la japanaj fervojistoj okazigas grandan kontraŭ-usonan manifestacion.



La iraka popolo faras kontraŭimperiisman manifestacion alte tenante la grandan sloganon "Kondamni al morto la malamikon de la diverslandaj popoloj — la usonan imperiismon".

Maldekstre: Nigrulaj studentoj de la Cornell-Universitato en la ŝtato Novjorko okupas la universitatan domon per revolucia perforto por protesti la politikon de rasa diskriminacio de la reakcia usona registaro.

Meze: Sirio okazigis manifestacion kaj mitingon kun centmiloj da popolanoj por kondamni la perfortan krimon de la usona imperiismo kaj libana registaro kaj subteni la justan batalon de la palestinaj gerilaj taĉmentoj.



sezono de 1969 aperis pasiva saldo de pli ol 68 milionoj da usonaj dolaroj en la eksterlanda komerco de Usono. Tio estas fenomeno neniam okazinta depost la jaro 1950. La usona imperiismo de ĉiam dependas de akiro de profito en dumpingo de komercaĵoj por ŝtopi la grandajn deficitajn en internacia bilanco pro agresado kaj ekspansiado. La malfortiĝo de la pozicio de Usono en la merkato de la kapitalisma mondo spegulis la dekadenciĝon de la usona imperiismo kun ĉiutago.

La ŝanĝiĝo de la rilatoj inter la fortoj de la kapitalismaj landoj efikis tiel, ke iuj el la okcident-eŭropaj landoj ne volentas daŭre ludi la rolon de "satelitoj" de Usono. Usono jam ne plu povas laŭplaĉe ordoni ilin kiel pasinte. La alianco de la agresa kliko de la usona imperiismo disfalis. En 1967, Francio forpelis samtempe el sia lando la komandejojn kaj militajn bazojn de la Nordatlantika Traktata Organizo kaj Usono. Usonaj ĵurnaloj veis: "Por Usono tuta erao jam finiĝis; jam finiĝis la erao de Usono kun la espero gajni al si la pozicion de gvidanto de la mondo utiligante monon kaj potencajn militajn fortojn."

III

La frenezaj armeekspansio kaj militpreparo kaj agresado al aliaj landoj fare de la usona imperiismo dronigis ĝin en krizoj de ŝtata spezo kaj financo, el kiuj ĝi ne povas sin liberigi. Usono havis financan deficiton en almenaŭ 17 el la 23 fiskaj jaroj post la finiĝo de la Dua Mondmilito, kaj la deficita totala sumo atingis pli ol cent dudek miliardojn da usonaj dolaroj. Por ŝtopi la grandan deficitan breĉon, la usona registaro povis fari nenion alian ol senskrupule emisii obligaciojn kaj monbiletojn, kio kaŭzis senprecedence seriozan inflacion. Ĝis la fino de la pasinta jaro, la obligacioj emisiitaj de la usona registaro atingis la totalan sumon de pli ol 370 miliardoj da usonaj dolaroj, t. e. 18-oblon de tiu de la jaro 1933. En la pasinta unu jaro, la totala sumo de papermono cirkulata en Usono kreskis je 11 procentoj kaj tiu rapideco estas neniam vidita antaŭe en la jaroj post la Dua Mondmilito. Antaŭ sia enpotenciĝo, Nixon fanfaronis, ke li ĉesigos la inflacion post sia enpotenciĝo. Sed ĝis nun inflacio ankoraŭ regas la tutan Usonon. Nun, eĉ usonaj ŝtataj funkciuloj devas konfesi, ke la usona dolaro valoras nur iom pli ol 37 cendojn de usona dolaro en 1939.

La monopola kapitalo de Usono energie transmetas la malfacilojn kaj krizon sur la laborantan popolon de Usono. En la jaro 1968, ĉiu usonano

devis pagi meznombro imposton de 1,100 usonaj dolaroj, t. e. je 30 procentoj pli multe ol en 1965. Kaj la flugrapida kreskado de la prezoj malaltigis la aĉetpovon de la popolamasoj. Kaj krome, sekve de la intensa konkurado inter la kapitalismaj landoj, la eksterlanda merkato de Usono ĉiam pli malgrandiĝas kaj tio neeviteble kondukas al ŝrumpo de la industria produkto de Usono. De 1945 ĝis 1961 en Usono okazis kvar "superproduktaj" krizoj, el kiuj tiu de 1957-1958 malkreskigis la industrian produkton je 14 procentoj. Nuntempe, la t. n. tri ekonomiaj kolonoj de Usono, nome ŝtala industrio, aŭto-industrio kaj konstrua industrio, kaj serio da aliaj gravaj industriaj branĉoj ĉiuj falis en la mizeran staton de nevendebleco de la produktaĵoj kaj reduktiĝo de la produktado. La produktado de aŭtomobiloj pasaĝeraj en la unuaj 7 monatoj kaj duono de 1969 malpliigis je 8 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de 1968. La produktokvanto de ŝtalo kaj fero de la unuaj kvin monatoj de 1969 malpliigis je 3.6 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de 1968. Nun Usono alfrontas novan ekonomian krizon.

Ĉio ĉi tio neeviteble kaŭzas akriĝon de la enlandaj klasaj kontraŭdiroj. Ĉiam pli multe da laboristoj ekbatalas brave, rompinte la katenadon de la ĉefoj de flavaj sindikatoj. En la jaro 1968, en Usono okazis ĉirkaŭ 5,000 laboristaj strikoj kaj tiu cifero estis la plej alta en la lastaj 15 jaroj. La potenca ŝtormo de la nigrula batalo en Usono donis pezan frapon al la usona imperiismo, kiu delonge dronas en malfacilegoj en- kaj eksterlandaj. La batalo de usonaj nigruloj kontraŭ la perforta subpremo en 1968 envolvis pli ol 160 urbojn tra la tuta lando nur en sep tagoj kaj Vaŝingtono brulis ruĝigante la ĉielon, kio estis neniam vidita post kiam la brita armeo entrudiĝis en tiun urbon en 1812 kaj bruligis ĝin. Ekde la jaro 1968, en Usono leviĝadas ŝtormoj de progresema studenta movado. En iuj lokoj, studentoj prenis kun si pafilojn por batali per revolucia forto kontraŭ la armita subpremo fare de la reakciaj armeanoj kaj policianoj. Usonaj burĝaj ĵurnaloj kriis kun timo, ke tiu stato estas "surpriza" kaj "kortremiga".

La akraj kontraŭdiroj kaj intensaj kolizioj similas al vulkano. **"La malamiko putriĝas tagon post tago, dum nia afero pliboniĝas kun ĉiu tago."** La disvolviĝo de la monda situacio plene pruvis la pravecon de tiu ĉi saĝa aserto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Restas jam ne multaj tagoj ĝis la kompleta enterigo de la usona imperiismo!

Forte Leviĝis Kuracaj Kostoj en Usono

EN la lastaj jaroj multe leviĝis la kuracaj kostoj en Usono. Tio multe seriozigis la mankon de kuracaj helpoj por la vasta usona laboranta popolo peze subpremata kaj ekspluatata, tiel ke grandnombraj malriĉuloj troviĝas ankoraŭ pli en tragedia stato de neeblo por ricevi kuracadon. Tio estas alia malbono, kiun la usonaj monopolaj burĝoj faras al la usona laboranta popolo.

Laŭ la informo de la usona gazetaro, la kuracaj kostoj en Usono, kiuj senĉese leviĝadis, nun jam atingis la "plej altan nivelon en la historio". La pago por diagnozo kaj kuraco en aprilo de 1969 pliiĝis je 53 procentoj kompare kun la meznombra sumo de tiu de 1957 ĝis 1959. La ĉiutaga pago por kuraciĝo en hospitalo en 1968 estis je 122 procentoj pli alta ol en 1959. Dum la lastaj kvar jaroj, en kiuj rapide disvolviĝis la inflacio kaj universale leviĝis la varprezoj, la kresko de kuracaj kaj "sanprotektaj" kostoj estis 1.5-oble pli alta ol tiu de aliaj vivkostoj.

La rapida leviĝo de kuracaj kostoj ankoraŭ pli malfaciligas la ricevon de kuraco por la vasta usona laboranta popolo, kiu jam vivas tre mizere. Ekzemple, la meznombra pago por kuraciĝo en hospitalo en Usono jam superis 70 dolarojn potage. Krome, altegaj estas ankaŭ la kostoj de kuraco kaj multaj medikamentoj, tiel ke tute ne eblas por la vasta laboranta popolo ricevi kuracadon.

Ekstreme mankas medicinaj laborantoj en kvartaloj enloĝataj de malriĉuloj kaj nigruloj kaj en la kamparo de Usono. Antaŭ nelonge la usona *Newsweek* informis, ke en malriĉulaj kvartaloj de iuj urboj troviĝas meznombre nur unu kuracisto por 6600 malriĉuloj. La usonaj nigruloj okupas ĉirkaŭ 10 procentojn de la tuta loĝantaro de Usono, sed nigrulaj kuracistoj okupas nur 2 procentojn de la kuracistoj de Usono. La usona reakcia reganta kliko praktikas la politikon de rasa diskriminacio, tio pli malfaciligas la ricevon de kuracado por la vastaj amasoj de malriĉaj nigruloj. Tre malfacile estas ankaŭ por malriĉaj loĝantoj en multaj urbetoj kaj kamparo viziti hospitalon aŭ kuracejon. Preĉipe indigniga estas tio, ke multaj hospitaloj kaj

kuracejoj simple rifuzas akcepti malriĉajn kaj nigrulajn malsanulojn kaj ne donas al ili kuracadon.

La mizera situacio de la usona laboranta popolo, kiu ne povas ricevi kuracadon okaze de malsano, estas pure rezulto de la putra kapitalisma sistemo de Usono kaj la krima politiko de la reakcia reganta kliko. La krimo de la usona reakcia reganta kliko jam vekas ĉiam pli fortan indignon kaj proteston de la vastaj amasoj de la usona popolo.

La usonaj urboj estas tre malpuraj, en ili diversaj epidemioj disvastiĝas furioze. Jen pro putriĝo haladzas amasigitaj ruboj en la urbo Texarkana, Texas.



MILIONO DA USONANOJ MANIFESTACIIS KONTRAŬ LA AGRESA MILITO EN VJETNAMIO

La 15-an de oktobro 1969, miliono da studentoj kaj popolanoj en ĉefaj grandaj kaj malgrandaj urboj de Usono, de Maine sur la orienta marbordo ĝis Kalifornio sur la okcidenta marbordo, protestis per la formoj de mitingoj, manifestacioj, disdono de flugfolioj, bruligo de konskriptaj kartoj, ĉesigo de laboro kaj aliaj kontraŭ la agresa milito de la usona imperiismo en Vjetnamio por postuli tujan retiriĝon de ĉiuj usonaj agresaj trupoj el suda Vjetnamio.

Miloj da junaj studentoj kaj popolanoj venintaj el Novjorko kaj Philadelphia okazigis potenca manifestacion antaŭ la terarmea bazo FT. Dix en New Jersey por protesti la agreson de la usona imperiismo en Vjetnamio, kaj la persekutadon fare de la reaktia aŭtoritato de tiu ĉi bazo al usonaj soldatoj oponantaj la agresan militon en Vjetnamio, kaj postuli ke ĝi liberigu la enkarcerigitajn soldatojn kaj ĉiujn politikajn malliberulojn.



Tiu landskala agado refoje pruvis, ke la agresa milito de la usona imperiismo en Vjetnamio renkontas ĉiam pli fortan oponon de la usona popolo. La situacio fariĝis pli kaj pli malfacila por Nixon, la ĉefo de la usona imperiismo. En la 15-a de oktobro en la ĉefurbo Vaŝingtono, la popolamasoj de diversaj socitavoloj tuttage manifestis per diversaj formoj sian firman oponon kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio. Nixon haste ordonis venigi policanojn por formi du kordonojn kontraŭ eventuala ensturmo de la manifestaciantaj amasoj kaj plie instaligi serĉlumilojn. Malgraŭ tio, ĉirkaŭ cent nigrulaj studentoj sturmis al la Blanka Domo kaj brave luktis kontraŭ faŝismaj policanoj. En la sama vespero 30,000 popolanoj okazigis grandskalan mitingon antaŭ la Monumento de Vaŝingtono kaj post tio ili faris duhoran manifestacion antaŭ la Blanka Domo.

En Boston ĉirkaŭ 100,000 homoj partoprenis manifestacion. En Philadelphia, Ĉikago, Pittsburgh, Los Anĝeles, Baltimore, New Haven kaj aliaj urboj la protestajn mitingojn kaj manifestaciojn partoprenis dek aŭ kelkdek mil homoj.

ĜENERALA STRIKO DE MILIONO DA LABORISTOJ EN MILANO DE ITALIO

En la regiono de Milano de Italio pli ol miliono da laboristoj faris ĝeneralan strikon je la 15-a de oktobro de 1969 por protesti kontraŭ la fluga altigo de prezoj de vivbezonaĵoj kaj lupago kaj kontraŭ la peza enspeza imposto, kiun la registaro kolektas de la laboristoj. Tiu ĝenerala striko kaŭzis fermon de la fabrikoj, entreprenoj kaj magazenoj kaj ĉesigon de komunikado kaj eldono de gazetaro, tiel ke Milano, la dua granda urbo de Italio, tute paralizigis.

Alte tenante sennombrajn ruĝajn flagojn kaj sloganajn tabulojn cent mil milanaj laboristoj marŝis en kvin longaj kolonoj de la antaŭurboj al la centra distrikto por fari grandan manifestacion kaj indigne protesti kontraŭ la krimea regado de la monopola burĝaro. Ili fine kolektiĝis en iu placo de la urbo kaj tie okazigis mitingon.

La vastaj amasoj de studentoj de Milano varme subtenis la justan batalon de la laboristoj. Pli ol 10,000 studentoj partoprenis ilian protestan mitingon batalante kun ili ŝultro-ĉe-ŝultre. Antaŭ tio, je la 11-a de oktobro, la studentoj okupis la Milanan Universitaton por subteni la strikon de la laboristoj kaj ilian okupadon de fabrikoj.

GRANDA STRIKO DE KARBOMINEJAJ LABORISTOJ DE YORKSHIRE DE BRITIO

La 13-an de oktobro de 1969 sepdek mil karbominejaj laboristoj en Yorkshire de Britio komencis grandan strikon por protesti kontraŭ la kruela ekspluato de la monopolaj kapitalistoj. En la batalo la strikantoj manifestis heroan kaj obstinan spiriton, kaj la strika batalo ekdisvastiĝis al aliaj regionoj.



La Aŭstra Leganto H. R. Skribis:

...Mi efektive ne kapablas distingi pli valoran enhavon de unu artikolo ol de alia, ĉar ĉiuj artikoloj estas ege interesaj kaj trapensitaj, ĉu pri nia amata Ĉefo Maŭ Zedong aŭ pri soldata heroo aŭ pri teknika inĝeniero aŭ pri meritplena kamarado. Ĉiuj priskriboj en *El Popola Ĉinio* estas intereseĝaj. Tutnature la verkoj estas legataj kun simpatio.

Profundan valoron havas la jena

frazo de Prezidanto Maŭ: "La sekvantaj 50 ĝis 100 jaroj proksimume depost nun estos granda erao de ĝisfunda ŝanĝo de la socia sistemo en la mondo." Precipe interesa estas la raporto farita de Vicprezidanto Lin Biaŭ en la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

Proponojn kaj postulojn mi tute ne havas. Profundan simpatian al Maŭ Zedong kaj la ĉina popolo.

La Ĉeĥoslovaka Leganto J.G. Skribis:

Ĝeneraldire, ĉiuj rubrikoj, artikoloj kaj kolorbildoj plaĉis al mi. Nu, se mi havas eblecon elekti, al mi plej multe plaĉis la rubriko "Post la Kurso", kiu alportas regule tre interesajn artikolojn pri popola milito kontraŭ la japana imperiismo

kaj ĉinaj burĝoj kaj reakciuloj. Poste al mi tre plaĉas ĉiuj artikoloj, kie oni praktike aplikas la pensojn de via granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, ekzemple, la artikoloj *Ni Estas Atestantoj de la Historio kaj Nova Caro* en N-ro 2 kaj *Lernejo de Nova Tipo Elkulturas Novajn Homojn* en N-ro 3.

La Finlanda Leganto T. K. Skribis:

Mi ŝatas la tutan enhavon de la gazeto. Speciale interesaj estas la artikoloj pri ĉinaj lernejoj, pri Sovetunio, pri eksterĉiniaj revoluciaj movadoj kaj pri unuopaj herooj, kaj la *Lecionoj de Ĉina Lingvo*. Ankaŭ ekz. *Konfeso en Senlirejo* kaj la kajero *For la Novajn Carojn!* kaj *Pri Resumo de Sperto* tre plaĉis al mi. Ĉiuj kolorbildoj estas bonegaj.



Ŝanĝo de Seruro

EN mateno de lundo, antaŭ ol komenciĝis laboro, la majstro kun ŝlosilo alvenis urĝeme al la laborejo por malfermi la pordon. Alproksimiĝinte, li trovis, ke la pordo estas jam malfermita. Kaj en la laborejo estas multaj radiofonaj partoj nove faritaj. Kiel tio fariĝis? La majstro estis tute surprizita. Post pridemandado, li informiĝis ke la seruro estis ŝanĝita de malgranda Kang, malgranda Vang kaj aliaj junaj metilernantoj.

Malgranda Kang kaj malgranda Vang estas metilernantoj de la Pekina Fabriko de Radioaparatoj nove venintaj ĉijare. Ili progresis rapide sub edukado de la laborista klaso. Majstroj diras unuanime ke ili estas novaj sturmuloj en la socialisma revolucia konkurso.

Ju pli alta estas la revolucia aktiveco de tiuj junaj laboristoj, des pli ilin amas kaj zorgas pri ilia maturiĝo la veteranaj laboristoj.

Iun sabaton, post la signalo pri laborĉeso, kelkaj junuloj ankoraŭ

absorbite prilaboris radiofonajn partojn. La majstro sciis ke ili jam daŭre batalis tri semajnojn sen ripozo dum dimanĉoj, li do admonis ilin ĉesigi la laboron, iri sin lavi, preni manĝon kaj bone ripozi en la dimanĉo. Malgranda Kang kaj malgranda Vang samvoĉe respondis: "Por vaste disvastigi Maŭzedongpenson, ni elkore ĝojas, ke ni povas pli multe produkti radiofonojn, eĉ laborante sen ripozo."

Trovante ke la junuloj havas tiel altan revolucionan fervoron, la majstro estis tre ĝoja en sia koro. Kaj li komprenis, ke estas tre malfacile nun konsentigi ilin al ripozo en la dimanĉo. Li cerbumis foje kaj foje kaj fine trovis, ke la sola rimedo estas reteni la ŝlosilon de la pordo de la laborĉambro. Kiam li forprenis la ŝlosilon, li pensis en si: "Ne povante eniri la laborejon, ili vole nevole devos ripozi en la dimanĉo."

Sed la zorgemo de la majstro fariĝis nova movforto por la junuloj, kiu stimulis ilin al daŭra batalado. Ili diris: "Ju pli la majstroj prizorgas

nin, des pli ni devas zorgi pri la produktado."

Kiam malgranda Kang kaj malgranda Vang finis sian laboron, ili levis la seruron. Kunŝovante la brovojn, ili ambaŭ pensis pri la sama demando: "Kiel oni eniru la laborejon morgaŭ, ne havante la ŝlosilon?" Saĝo ja venas en urĝa bezono. Malgranda Kang subite trovis la ŝlosilon de la tirkesta seruro kaj eksplodis de ĝojo: "Metu la seruron de la tirkesto sur la pordon. Ĉu tiam la ŝlosilo de la pordo ne estos denove en niaj manoj?" Ĉiuj junuloj ekĝojis kun rido kaj unuanime aprobis tiun ideon.

En la lundo, la junuloj iris al la laborejo pli frue ol la majstro, malfermis la pordon kaj ŝlosis la tirkeston por ke la majstro ne povu rimarki la ŝanĝon de la seruro.

Kiam majstroj aŭdis poste la historion de ŝanĝo de seruro, ili diris kortuŝite: "La aktiveco de la junuloj en revolucia konkurso ja estas neŝlosebla."

Korespondi Deziras

*R.J.Zvěřina, interesiĝas pri adresoj de esperantistoj, marksistoj-leninistoj en ne-eŭropaj ŝtatoj. Adr: 5. Května 26, Liberec 1. ĈSSR

*Paulo Isaias Ereno el Brazilo interŝ. pri filozofio kaj komunismo k. dez. kor. kun tiu kiu povus korespondiĝi pri tiuj aferoj. Bv. skribi al Paulo Isaias Ereno, Caixa postal 105, Maceio-Ala.

*Tarnoczi Istvan, 19-jara ĉeflerneja knabo ŝatus korespondi kun esperantistoj. Adr: Szarvas, Szabadsag ut 1-3, Hungario.

*Bratu Ion, str. GRIVITEI Nr. 408 BRAILA, RUMANIO. 19 j. studento. interŝ. fotojn, alumetetiketojn, insignojn, diskojn. Respondo garantiita.

*Lidmila Radova, dez. kor. Adr: Osvobozeni 63, Chele, ĈSSR

*F-ino Wanda Janina Knobloch, inĝenierino pri nutraĵ-industrio, WROCLAW, str. Stalowa 73/9, Pollando — dez. kor. kun ĉiuj landoj pri turismo, literaturo, kulturo, arto; interŝanĝas bildkartojn, P.M., albumojn kaj prospektojn.

*Janusz Kutysz, dez. kor. kun aziaj landoj. Adr: GDANSK, str. Laskowa 62-3, Pollando.

*Ĉiba-Universitato Esperanto-Klubo dez. kor. kun ĉiuj landoj pri diversaj temoj. Adr: Jajoi, Ĉiba-ŝi, Ĉiba-ken, Japanio.

*Gawanowski Stanistaw dez. kor. pri ĉiuj temoj kun ĉiu. Adr: Sulechow, Piaskowa 21, Ziel-Gora, Pollando.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (138) 1970

Ĉefa Enhavo

Kamarado Lin Biaŭ en la Periodo de la Liberiga Milito en Nordoriento

Ruĝa 9-a Roto — Modelo de Studo de Verkoj de Prezidanto Maŭ

Diverslandaj Popoloj Aktive Eldonas Verkojn de Prezidanto Maŭ

En Batalo Ili lernas Maŭzedongpenson

En la 1969-jara Aŭtuna Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio

Fluga Disvolviĝo de la Petrola Industrio de Nia Lando

Atingoj de la Ŝpinteksa Industrio de Ĉinio

Impetas la Unua Aŭtofabriko en Ĉangĉun

Lando de Fiŝoj kaj Rizo — Lando de Revolucio

La "Indiĝenaj Specialistoj" Bonvenigataj de la Malriĉkampanoj kaj Malsuperaj Mezkampanoj

Agrikultura Scienca Eksperimentado en Ĵongĝong

Aromas Floroj en Hukiu-komunumo

La Suno Lumigas la Tutan Tibetan Altebenejon

En la Tagoj Kiam Ni Okupiĝis pri Esperantaj Laboroj en Jan-an

Nova Trompaĵo de Usono kaj Sovetunio

La Usona Imperiismo Putriĝas Tagon post Tago

Forte Leviĝis Kuracaj Kostoj en Usono

Sur la Kovrilo:


Diversnaciaj gejunuloj kun revolucia entuziasmo prikantas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Sur la Dorskovrilo:

En la granda festtago, ĉefurbaj laboristoj paradas sur Tiananmen-placo, ĉirkaŭante bele ornamitajn ĉarojn kun modeloj de la novaj atingoj sur la industria fronto.

En la Feliĉaj Tagoj de Estado ĉe Prezidanto Maŭ

—Reprezentantoj el diversaj lokoj de la lando partoprenintaj la solenon de la nacia festo en Pekino



La diversnaciaj reprezentantoj akceptitaj de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin raportas en la sama nokto la ekstreme ĝojigan novaĵon al siaj karuloj kun senkompare feliĉa sento.



(Maldekstre) Re prezentantoj venintaj el la sankta loko de revolucio Jan-an diligente studas verkon de Prezidanto Maŭ.

Heroaj batalantoj venintaj el la regiono de Ĝenbaŭ-insulo vizitas maljunan laboriston kamarado Liu Bingbo (la meza), kiu partoprenis la Strikon de la 7-a de Februaro. Ili esprimis, ke ili nepre daŭrigos la gloran revolucion tradicion kaj disvolvos la ĝisfunde revolucion spiriton de sentimco al malfaciloj kaj morto.



(Maldekstre) Rezentantoj de la ŝtalaj laboristoj venintaj de Anŝan, Ŝanhajo kaj Ma-anŝan renkontiĝis kun la revoluciaj laboristoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio. Ili kune esprimis, ke ili nepre pliapaŝe kondukos solide la socialisman revolucion konkurson por gajni pli grandajn venkojn en revolucio kaj produktado.



(Supre) Rezentantoj venintaj de la hejmloko de Prezidanto Maŭ, la Ŝaŭŝana Komunumo, interparolas kun kamparanaj reprezentantoj el la provincoj Ŝandong, Ĝegiang k. a. pri la feliĉo vidi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.



(Supre) Rezentantoj de intelektaj junuloj, kiuj fiksoĝas en la kamparo de la provincoj Gianghi, Anhuj, Ĝegiang, Ŝandong k. a., interparolas pri siaj atingoj en reeduko donita de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Rezentantoj akceptitaj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Viceprezidanto Lin sendas telegramojn al siaj karuloj por sciigi al ili la eksterordinare ĝojigan novajon.



